« Voulez-vous me permettre d'avancer la visite que je devais vous faire jeudi ? Un télégramme me rappelle à Nevers demain. Nous viendrons aujourd'hui, ma tante et moi, vers quatre heures, après les vêpres de ces dames.

« Ma tante est heureuse de vous demander plus tôt qu'il n'était convenu, la faveur d'un entretien, et je vous prie de croire, cher monsieur, à mes respectueuses sympathies. »

Signé : « PAUL ROLAND. »

M. Paul et sa tante seront ici à quatre heures. Ils parleront à ton père et nous serons fixés ce soir. Oh ! ma fille, que je suis contente ! D'abord, je n'aurais pas pu attendre jusqu'à jeudi. Je me minais. C'était mortel ! Oh ! ma chérie ! Dans trois heures, M. Paul aura fait officiellement demander ta main à ton père, et ton père aura dit oui.

HENRIETTE. — Ou non.

MADAME LEPIC. — Oui. Cette fois, ça y est, je le sens !

HENRIETTE. — Comme l'autre fois.

MADAME LEPIC — Si, si. Ton père a beau être un ours...

HENRIETTE. — Je t'en prie...

MADAME LEPIC. — Moi, je dis que c'est un ours ; toi, avec ton instruction, tu dis que c'est un misanthrope ; ça revient au même. Il a beau être ce qu'il est, il recevra la tante Bâche et M. Paul, j'imagine !

HENRIETTE. — Il les recevra, comment?

MADAME LEPIC. — Le plus mal possible, d'accord ; mais j'ai prévenu M. Paul; il ne se laissera pas intimider, lui, par l'attitude, les airs dédaigneux ou les calembours de ton père. M. Paul saura s'exprimer. C'est un homme, et tu seras Mme Paul Roland.

HENRIETTE. — Espérons-le.

MADAME LEPIC. — Tu y tiens?

HENRIETTE. — Je suis prête.

MADAME LEPIC. — Tu es sûre que M. Paul t'aime ?

HENRIETTE. — Il me l'a dit.

MADAME LEPIC. — À moi aussi. Et quoi de plus naturel ? Tu as une jolie dot.

HENRIETTE. — Combien, maman?

"Ĉu vi bonvolas permesi al mi fruigi la viziton kiun mi planis fari ĵaŭde? Telegramo devigas min reiri al Neverso morgaŭ. Ni venos hodiaŭ, mia onklino kaj mi, proksimume je la kvara, post la vespro de niaj sinjorinoj.

"Mia onklino estas feliĉa peti de vi, pli frue ol ni interkonsentis, favoron pri intervidiĝo, kaj bonvolu kredi, kara sinjoro, ke mi respekteme salutas vin.

Subskribo: "PAŬLO ROLANDO"

S-ro Paŭlo kaj sia onklino ĉeestos tie je la kvara horo. Ili parolos al via patro kaj ili informos nin ĉi-vespere. Ho! Mia filino, kiel kontenta mi estas! Unue, mi ne povus atendi ĝis ĵaŭdo. Mi estis plena de angoro. Estis mortige! Ho! Mia karulino! Post tri horoj, s-ro Paŭlo oficiale petos vian manon de via patro, kaj via patro jesos.

HENRIETO. — Aŭ ne.

SINJORINO LEPIKO. — Jes. Ĉi-foje, estos sukceso, mi sentas tion!

HENRIETO. — Kiel lastfoje.

SINJORINO LEPIKO. — Jes ja. Kvankam via patro estas sovaĝa kiel urso....

HENRIETO. — Mi petas vin...

SINJORINO LEPIKO. — Mi ja diras ke li estas urso; vi, bonedukita, vi diras ke li estas mizantropo; tio estas same. Kvankam li estas tiel kiel li estas, li akceptos onklinon Baŝon kaj s-ron Paŭlon, laŭ mi!

HENRIETO. — Kiel li akceptos ilin?

SINJORINO LEPIKO. — Kiel eble plej malbone, konsentite; sed mi avertis s-ron Paŭlon; via patro ne sukcesos timigi lin per sia sinteno, sia malestimema mieno aŭ per siaj vortludoj. S-ro Paŭlo scios kiel esprimiĝi. Li estas viro, kaj vi estos la edzino de Paŭlo Rolando.

HENRIETO. — Ni esperu.

SINJORINO LEPIKO. — Ĉu tio gravas por vi?

HENRIETO. — Mi estas preta.

SINJORINO LEPIKO. — Ĉu vi certas ke s-ro Paŭlo amas vin?

HENRIETO. — Li tion diris al mi.

SINJORINO LEPIKO. — Ankaŭ al mi. Tutnormale, ĉu ne? Vi havas allogan doton.

HENRIETO. — Kiom da, panjo?

MADAME LEPIC. — Est-ce que je sais? 40.000... 50.000 ! J'ai dit 50.000. Ce serait malheureux qu'avec notre fortune...

HENRIETTE. — Quelle fortune, maman?

MADAME LEPIC. — Celle qui est là, dans notre coffre-fort. Je l'ai encore vue l'autre jour ! Si tu crois que ton père me donne des chiffres exacts !... Il faut bien que j'en trouve, pour renseigner les marieurs. Et puis tu n'as pas qu'une belle dot. Tu es instruite. Tu es très bien. Inutile de faire la modeste avec ta mère... Enfin, tu n'es pas mal.

HENRIETTE. — Je ne proteste pas.

MADAME LEPIC. — Tu plais à M. Paul. Il te plaît. Il me plaît. Il plaira à M. Lepic.

HENRIETTE. — Ce n'est pas une raison.

MADAME LEPIC. — Alors, M. Lepic dira pourquoi... ou je me fâcherai...

HENRIETTE. — Ce sera terrible !

MADAME LEPIC, *piquée*. — Certainement... Je ne me mêle plus de rien.

HENRIETTE. — Si, si, maman, mêle-toi de tous mes mariages, c'est bien ton droit... et ton devoir. Et je ne demande pas mieux que de me marier ; mais tu te rappelles M. Fontaine, l'année dernière...

MADAME LEPIC — M. Fontaine n'avait ni les qualités, ni la situation, ni le prestige...

HENRIETTE. — Oh ! épargne-le... maintenant ! il est loin !

MADAME LEPIC. — Tu ne vas pas me soutenir que M. Fontaine valait M. Paul.

HENRIETTE. — Nous l'aurions épousé tout de même, tel qu'il était. Il ne me déplaisait pas.

MADAME LEPIC. — Il te plaisait moins que M. Paul.

HENRIETTE. — Je l'avoue. Il te plaisait naturellement.

MADAME LEPIC. — Pourquoi naturellement ?

HENRIETTE. — Parce que tu n'es pas regardante et qu'ils te plaisent tous.

MADAME LEPIC. — C'est à toi de les refuser, en définitive, non à moi.

HENRIETTE. — Oui, oui, maman. Je suis libre et papa aussi.

SINJORINO LEPIKO. — Ĉu mi scias? 40000... 50000 ! Mi diris 50000. Estus bedaŭrinde, kun nia riĉeco...

HENRIETO. — Kiu riĉeco, panjo?

SINJORINO LEPIKO. — Tiu-ĉi kiu estas tie, en nia kirasŝranko. Mi vidis ĝin ankoraŭ de nelonge! Se vi kredas ke via patro diras al mi ekzaktajn ciferojn!... Necesas ke mi imagu kelkajn, por informi svatistojn. Plue vi ne havas nur belan doton. Vi estas instruita. Vi estas tre valora. Ne ludu la modestulon fronte al via patrino... Fine, vi sufiĉe konvenas.

HENRIETO. — Mi ne protestas.

SINJORINO LEPIKO. — Vi plaĉas al s-ro Paŭlo. Li plaĉas al vi. Li plaĉas al mi. Li plaĉos al s-ro Lepiko.

HENRIETO. — Tio ne estas ĝusta rezono.

SINJORINO LEPIKO. — Tiam, s-ro Lepiko diros kial... aŭ mi koleriĝos....

HENRIETO. — Tio estos terura!

SINJORINO LEPIKO, *incitita*. — Certe... Mi ne plu enmiksiĝas en iun ajn aferon.

HENRIETO. — Jes ja, panjo, enmiksiĝu en ĉiujn miajn edziĝojn, tio estas ja via rajto... kaj via devo. Kaj mi petas nur tion, edziniĝi; sed vi memoras pri s-ro Fontano, lastjare...

SINJORINO LEPIKO. — S-ro Fontano havis nek la kvalitojn, nek la situacion, nek la prestiĝon...

HENRIETO. — Ho! Indulgu lin... nun! Li estas malproksime.

SINJORINO LEPIKO. — Vi ne pretendos ke s-ro Fontano egalvaloris s-ron Paŭlon.

HENRIETO. — Ni tamen edziniĝus kun li, kiel li estis. Li ne malplaĉis al mi.

SINJORINO LEPIKO. — Li plaĉis al vi malpli ol s-ro Paŭlo.

HENRIETO. — Mi konfesas tion. Li kompreneble plaĉis al vi.

SINJORINO LEPIKO. — Kial kompreneble?

HENRIETO. — Ĉar vi ne estas postulema kaj ĉiuj plaĉas al vi.

SINJORINO LEPIKO. — Estas vi kiu devus rifuzi ilin, finfine, ne mi.

HENRIETO. — Jes ja, panjo. Mi estas libera kaj ankaŭ paĉjo.

MADAME LEPIC. — Il ne va pourtant pas refuser tout le monde.

HENRIETTE. — Ce ne serait que le deuxième !

MADAME LEPIC. — Et sans donner de motifs... Je vois encore ce M. Fontaine, qui était en somme acceptable, quitter ton père après leur entretien, nous regarder longuement comme des bêtes curieuses, nous saluer à peine, prendre la porte et... on ne l'a jamais revu.

HENRIETTE. — Il avait déplu à mon père...

MADAME LEPIC. — Ou ton père lui avait déplu. M. Lepic n'a rien daigné dire et toi tu n'as rien demandé.

HENRIETTE. — C'était fini.

MADAME LEPIC. — Et pourquoi ? Mystère !

HENRIETTE, *rêveuse*. — Je cherche à deviner. Mon père n'est peut-être pas partisan du mariage.

MADAME LEPIC. — Je te remercie !... C'est ça qui te pendait au bout de la langue?

HENRIETTE. — Oh ! maman !

MADAME LEPIC — Tu as de l'esprit, sauf quand ton père est là. Tu ne débaîlles pas devant lui. Prends garde qu'il ne reçoive ton M. Roland comme il a reçu ton M. Fontaine.

HENRIETTE. — Je le crains et je voulais dire que, peut-être, mon mariage lui est indifférent.

MADAME LEPIC. — Oh ! tu me révoltes. Ton père ne t'aime pas comme je t'aime, aucun père n'aime comme une mère, nous le savons ; mais le père le plus dénaturé tient à marier sa fille.

HENRIETTE. — Ne serait-ce que pour se débarrasser d'elle.

MADAME LEPIC. — Dirait-on pas que tu as une tache !

HENRIETTE. — Quelle tache?

MADAME LEPIC — Ah ! si tu prends tout ce que je dis de travers.

HENRIETTE. — Je m'énerve.

MADAME LEPIC — C'est l'émotion des mariages. Calmons-nous, ma pauvre fille, je te jure que ce mariage réussira. S'il venait à manquer, moi qui suis déjà la plus malheureuse des femmes, je serais la plus malheureuse

SINJORINO LEPIKO. — Li tamen ne rifuzos ĉiujn.

HENRIETO. — Tiu estus nur la dua!

SINJORINO LEPIKO. — Kaj sen doni motivojn... Mi ankoraŭ vidas tiun s-ron Fontanon, kiu estis finfine akceptebla, lasi vian patron post ilia interparolado, longe rigardi nin kiel strangaj bestoj, apenaŭ adiaŭi nin, eliri kaj... oni neniam revidis lin.

HENRIETO. — Li malplaĉis al mia patro...

SINJORINO LEPIKO. — Aŭ via patro malplaĉis al li. S-ro Lepiko eĉ ne unu vorton diris kaj vi nenion demandis.

HENRIETO. — Tio estis finita.

SINJORINO LEPIKO. — Kaj kial? Mistero!

HENRIETO, *revema*. — Mi provas diveni. Mia patro eble ne estas adepto de edzeco.

SINJORINO LEPIKO. — Mi dankas vin!... Ĉu estis tio kio pendis je via lango?

HENRIETO. — Ho! Panjo!

SINJORINO LEPIKO. — Vi estas sprita, krom kiam via patro ĉeestas. Vi tute ne malfermas la buŝon fronte al li. Gardu vin ke li ne akceptu vian s-ron Rolandon kiel li akceptis vian s-ron Fontanon.

HENRIETO. — Mi tion timas kaj mi volis diri ke, eble, mia edziĝo estas al li egala.

SINJORINO LEPIKO. — Ho! Vi indignigas min. Via patro ne amas vin kiel mi amas vin, neniu ajn patro amas kiel patrino, ni tion scias; sed eĉ la patro la plej malplena de familiaj sentoj absolute deziras edzinigi sian filinon.

HENRIETO. — Almenaŭ por liberiĝi de ŝi.

SINJORINO LEPIKO. — Oni dirus ke vi havas mankon!

HENRIETO. — Kia manko?

SINJORINO LEPIKO. — Ha! Se vi miskomprenas ĉion kion mi diras.

HENRIETO. — Mi nervoziĝas.

SINJORINO LEPIKO. — Estas la edzidĝa emocio. Ni trankviliĝu, mia kompatinda filino, mi ĵuras al vi ke tiu edziĝo sukcesos. Se ĝi ne okazus, mi kiu jam estas la plej malfeliĉa el la virinoj, iĝus la plej malfeliĉa el la

des mères.

HENRIETTE. — Ce serait complet. Il ne te manquerait plus rien. Ne te désole donc pas, ma pauvre maman, puisque, cette fois, ça y est. Tu vois, je ris !

MADAME LEPIC. — Oui, tu ris comme un chien qui a le nez pris dans une porte ! Ris mieux que ça. — À la bonne heure ! Et puis, sois adroite. Une vraie femme doit toujours céder, pallier, composer.

HENRIETTE. — À propos de quoi, maman ?

MADAME LEPIC. — À propos de tout. Rappelle-toi ce que dit M. le curé sur les petits mensonges nécessaires, qui atténuent; ainsi, par exemple, ton père déteste les curés; eh bien, si ça le prend, écoute-le un peu, pas trop, une minute. C'est dur ! Qu'est-ce que ça te fait? Veux-tu épouser M. Paul Roland, oui ou non?

HENRIETTE. — Oui, maman, tu as raison ! Je veux me marier, il faut que je me marie !

SCÈNE IV

LES MÊMES, MADELEINE

MADELEINE, *toilette des dimanches. Un petit livre de messe à la main.* — Qu'est-ce que vous avez ?

MADAME LEPIC, *encore désolée.* — Nous sommes dans la joie !

MADELEINE. — Ah ! oui !

MADAME LEPIC. — M. Paul et sa tante, Mme Bâche, viendront, à quatre heures, demander à M. Lepic la main d'Henriette.

MADELEINE, *gaie.* — M. Paul Roland? Vrai ?

MADAME LEPIC. — Il nous a prévenus par cette lettre. Lis, tu peux lire. M. Lepic est enchanté !

MADELEINE, *à Henriette.* — Veinarde !... Oh ! quelle bonne nouvelle ! Ça me met en joie aussi, comme demoiselle d'honneur. (*À Henriette.*) Tu me gardes toujours, hein?

HENRIETTE. — Tu es indispensable. Tu seras la demoiselle d'honneur de tous mes projets de mariage !

MADELEINE. — Comme si tu coiffais sainte Catherine ? tu n'as pas vingt ans ! Je passais vous prendre pour aller aux vêpres; vous ne venez pas ?

MADAME LEPIC. — Oh ! si ! Manquer les vêpres aujourd'hui ? Mais nous ne resterons pas au salut, pour être sûrement de retour à l'arrivée de

patrinoj.

HENRIETO. — Tio estus kompleta. Nenio plu mankus al vi. Do ne afliktiĝu, mia kompatinda panjo, ĉar ĉi-foje, estas en ordo. Vi vidu mi ridas!

SINJORINO LEPIKO. — Jes, vi ridas kiel hundo kiu havas nazon pinĉita en la pordo! Ridu pli bone ol tio. — Bonege! Kaj, estu lerta. Vera virino devas ĉiam cedi, ŝajnrimedi, kombini.

HENRIETO. — Pri kio, panjo?

SINJORINO LEPIKO. — Pri ĉio. Memoru tion kion diras s-ro pastro pri necesaj mensogetoj, kiuj faciligas; tiel, ekzemple, via patro malamas pastrojn; do, se tio okazas al li, auskultu lin iomete, ne tro, unu minuton. Tio estas malfacile! Kion tio faras al vi! Ĉu vi volas edziniĝi kun s-ro Paŭlo Rolando, jes aŭ ne?

HENRIETO. — Jes, panjo, vi pravas! Mi volas edziniĝi, necesas ke mi edziniĝu!

KVARA SCENO

LA SAMAJ, MAGDALENO

MAGDALENO, *festvestita. Mesa libreto ĉe la mano.* — Kio okazas al vi?

SINJORINO LEPIKO, *ankoraŭ malĝoja.* — Ni ĝojas!

MAGDALENO. — Ha! Jes!

SINJORINO LEPIKO. — S-ro Paŭlo kaj lia onklino, s-ro Baŝo, venos, je la kvara, peti al s-ro Lepiko la manon de Henrieto.

MAGDALENO, *gaja.* — Ĉu s-ro Paŭlo Rolando? Ĉu vere?

SINJORINO LEPIKO. — Li avertis nin per tiu letero. Legu, vi povas legi. S-ro Lepiko estas ravita!

MAGDALENO, *al Henrieto.* — Bonŝanculino! Ho! Kia bona novaĵo! Tio ankaŭ ĝojigas min, kiel honorknabino (*Al Henrieto.*) Ĉu vi plu konservas min, ĉu?

HENRIETO. — Vi estas nepra. Vi estos la honorknabino por ĉiuj miaj edziĝaj planoj!

MAGDALENO. — Kvazaŭ vi estus maljuna fraŭlino, ĉu? Vi eĉ ne estas dudekjara! Mi venis por akompani vin al vespro; ĉu vi ne venos?

SINJORINO LEPIKO. — Jes ja! Ĉu ne ĉeesti vespron, hodiaŭ? Sed ni ne restos dum la saluto, por certe esti hejme por la alveno de s-ro Paŭlo kaj lia

M. Paul et de sa tante.

MADELEINE. — Comme nous bavarderons à l'église !

MADAME LEPIC. — Commencez tout de suite, mes filles. Je vais préparer un bon goûter de quatre heures et je vous rejoins.

SCÈNE V

HENRIETTE, MADELEINE

MADELEINE, *au cou d'Henriette*. — Que je te félicite et que je t'embrasse ! M. Paul Roland est très bien.

HENRIETTE. — Tu trouves ?

MADELEINE. — Très, très bien. J'en voudrais un comme lui.

HENRIETTE. — Tu me fais plaisir.

MADELEINE. — Avec des yeux plus grands.

HENRIETTE. — Si tu y tiens.

MADELEINE. — Ça ne te contrarie pas ?

HENRIETTE. — Moi-même, je les trouve un peu petits.

MADELEINE. — Ce n'est qu'un détail. Et puis, M. Paul Roland a une belle position. Tout le monde le sait. Il va faire une demande officielle pour la forme. Il t'aime ?

HENRIETTE. — Je crois.

MADELEINE. — Et tu l'aimes ?

HENRIETTE. — Oui, mais je n'ose pas trop me lancer.

MADELEINE. — M. Lepic et lui sont déjà d'accord ?

HENRIETTE. — Papa n'a encore rien dit à personne.

MADELEINE. — Même à toi ? Tu n'as pas causé avec lui ?

HENRIETTE. — Est-ce que je cause avec papa ?

MADELEINE. — M. Lepic et moi, nous causons. Nous sommes une paire d'amis intimes.

HENRIETTE. — Tu n'es pas sa fille !

MADELEINE. — Je suis la fille de papa. Mais j'ai des causeries sérieuses avec papa.

HENRIETTE. — Ton papa n'est pas marié avec maman.

onklino.

MAGDALENO. — Kiel ni babilos en la preĝejo!

SINJORINO LEPIKO. — Komencu tuj, miaj fraŭlinoj. Mi preparos bongustan manĝeton por la kvara horo kaj mi retrovos vin.

KVINA SCENO

HENRIETO, MAGDALENO

MAGDALENO, *ĉe la kolo de Henrieto*. — Ke mi gratulu vin kaj ke mi kisu vin! S-ro Paŭlo Rolando estas valorega.

HENRIETO. — Ĉu vi opinias?

MAGDALENO. — Tre valorega. Mi dezirus unu kiel li.

HENRIETO. — Vi plezurigas min.

MAGDALENO. — Kun pli grandaj okuloj.

HENRIETO. — Se vi volas.

MAGDALENO. — Ĉu tio ne ĉagrenas vin?

HENRIETO. — Ankaŭ mi trovas ilin iomete malgrandaj.

MAGDALENO. — Tio estas nur detalo. Kaj krome, s-ro Paŭlo Rolando havas belan situacion. Ĉiuj tion scias. Li faros oficialan peton por la formo. Ĉu li amas vin?

HENRIETO. — Mi kredas.

MAGDALENO. — Kaj ĉu vi amas lin?

HENRIETO. — Jes, sed mi ne tro kuraĝas iniciati.

MAGDALENO. — Ĉu s-ro Lepiko kaj li jam interkonsentas?

HENRIETO. — Paĉjo ankoraŭ nenion diris al iu.

MAGDALENO. — Ĉu eĉ ne al vi? Ĉu vi ne parolis kun li?

HENRIETO. — Ĉu mi parolas kun paĉjo?

MAGDALENO. — S-ro Lepiko kaj mi ja parolas. Ni estas paro de intimaj amikoj.

HENRIETO. — Vi ne estas lia filino!

MAGDALENO. — Mi estas la filino de paĉjo. Sed mi havas seriozajn paroladojn kun paĉjo.

HENRIETO. — Via patro ne edziĝis kun mia panjo.

MADELEINE. — Ah ! non !

HENRIETTE. — Tout est là, Madeleine. À chacun sa famille, et tu le sais bien.

MADELEINE. — Je sais que dans la tienne, il fait plutôt froid, mais il me semble que, pour un cas aussi grave que ton mariage, on se dégèle.

HENRIETTE. — Écoute, ma chérie, M. Paul m'écrit de temps en temps. Or, chaque lettre que je reçois, je la montre à papa. Il ne la regarde même pas !

MADELEINE. — Eh bien ! après ? M. Lepic pense que les lettres de M. Paul sont à toi seule.

HENRIETTE. — C'est la même chose pour mes réponses. Je les lui offre à lire ; il ne les regarde pas.

MADELEINE. — Je trouve ça très délicat. M. Lepic vous laisse écrire librement. Moi, je ne montrerai mes lettres à personne. Tu ne peux pas reprocher à ton père sa discrétion.

HENRIETTE. — Je lui reproche de ne pas s'apercevoir de mes efforts, de me paralyser, de me faire peur. Oh ! et puis, je ne lui reproche rien.

MADELEINE. — Oui, tu me répètes souvent que tu as peur de ton père. Comme c'est drôle !

HENRIETTE. — Depuis ma sortie de pension, depuis quatre années que je vis dans cette maison, au milieu des miens, entre mon père, qui n'aime que la franchise, et ma mère, qui s'en passe volontiers, je ne fais qu'avoir peur. J'ai peur de tout, j'ai peur de lui, j'ai peur...

MADELEINE. — De ta mère?

HENRIETTE. — Oh ! non. Mais à chaque instant, j'ai peur pour elle ! Si tu savais, Madeleine, comme il est facile à une femme d'être insupportable à son mari ! Alors j'ai peur de moi, peur de mon mariage, de l'avenir, de la femme que je serai.

MADELEINE. — Tu as peur d'être une femme insupportable à M. Paul?

HENRIETTE. — Je ne suis pas sûre de rendre mon mari heureux.

MADELEINE. — Qu'il te rende heureuse d'abord ! On s'occupera de lui après.

HENRIETTE. — Je ressemble beaucoup à ma mère.

MADELEINE. — Quoi de plus naturel ?

HENRIETTE. — Je m'entends !

MAGDALENO. — Ha! Ne!

HENRIETO. — Ĉio estas tie, Magdaleno. Al ĉiu sia propra familio, kaj vi tion bone scias.

MAGDALENO. — Mi scias ke en la via, estas pliĝuste malvarme, sed ŝajnas al mi ke, por tiel grava okazaĵo kiel via edziĝo, oni malfrostiĝu.

HENRIETO. — Aŭskultu, kara mia, s-ro Paŭlo skribas al mi de tempo al tempo. Nu, ĉiun leteron kiun mi ricevas, mi montras al paĉjo. Li eĉ ne rigardas ĝin!

MAGDALENO. — Do, ĉu... kaj poste? S-ro Lepiko pensas ke la leteroj de s-ro Paŭlo apartenas nur al vi.

HENRIETO. — Estas same por miaj respondoj. Mi ilin proponas al li legi; li ne rigardas ilin.

MAGDALENO. — Mi opinias tion tre delikata. S-ro Lepiko permesas al vi libere skribi. Mi ja montros miajn leterojn al neniuj. Vi ne povas riproĉi al via patro lian diskretecon.

HENRIETO. — Mi riproĉas al li ke li ne rimarkas miajn klopodojn, paralizas min, timigas min. Ho! Kaj fine, mi al li riproĉas nenion.

MAGDALENO. — Jes, vi ofte ripetas al mi ke vi timas pri via patro. Kiel strange!

HENRIETO. — De mia eliro el lernejpensiono, de kvar jaroj de kiam mi vivas en tiu hejmo, meze de miaj proksimuloj, inter mia patro kiu nur ŝatas sincerecon, kaj mia patrino kiu volonte vivas sen, mi nur timas. Mi timas pri ĉio, mi timas pri li, mi timas...

MAGDALENO. — Ĉu pri via patrino?

HENRIETO. — Ho! Ne. Sed ĉiumomente, mi timas por ŝi! Se vi scius, Magdaleno, kiel estas facile por virino esti neeltenebla por sia edzo! Tiam mi timas pri mi, timas pri mia edzeco, pri la venonto, pri la virino kiu mi estos.

MAGDALENO. — Ĉu vi timas esti neeltenebla edzino por s-ro Paŭlo?

HENRIETO. — Mi ne certas ke mi feliĉigos mian edzon.

MAGDALENO. — Ke li unue feliĉigu vin! Oni prizorgos lin poste.

HENRIETO. — Mi multe similas mian patrinon.

MAGDALENO. — Nenio pli natura, ĉu?

HENRIETO. — Mi komprenas min!

MADELEINE. — Va mettre ton chapeau et allons aux vêpres, ça te distraira.

HENRIETTE. — Ça ne me fait plus aucun bien. Tu sais si j'aime M. le curé, si j'ai en lui une confiance absolue. Eh bien ! elle se trouble, et à l'église, depuis quelques jours, je prie machinalement ; je ne prie plus, je rêve, je pense à des actes de foi que les hommes ne peuvent ou ne veulent pas comprendre.

MADELEINE. — Ils pourraient. Ils ne veulent pas. C'est des choses de femmes et de curé, ça ne regarde pas les hommes.

HENRIETTE. — Pourquoi, Madeleine?

MADELEINE. — Ça leur est égal ; mon père, lui, s'en moque !

HENRIETTE. — Le mien, non.

MADELEINE. — Il a pourtant une forte tête, ton père !

HENRIETTE. — C'est peut-être là le malheur !

MADELEINE. — Henriette, tu avais trop de prix à la pension ! Veux-tu un conseil de ta petite amie ? Tu sais si papa est tendre pour moi. Eh bien ! je vais te faire une confidence qui t'étonnera : il lui arrive, comme aux autres, de boudier.

HENRIETTE, *ironique*. — Oh ! c'est grave !

MADELEINE. — Ça me fait souffrir ; il n'y a pas que toi de sensible ! Mais dès que je m'aperçois qu'il boude, je ne compte ni une ni deux, je saute à son cou, et j'y reste pendue, jusqu'à ce qu'il déboude, et ce n'est pas long !...

HENRIETTE. — Sauter au cou de papa !

MADELEINE, — Tu verras l'effet que ça fait !

HENRIETTE. — Au cou de papa ! Madeleine !

MADELEINE. — Eh bien ! quoi, ce n'est pas le clocher !

HENRIETTE. — J'aimerais mieux sauter dans la rivière.

MADELEINE. — Il est grand temps que tu te maries !... Tu ne peux pas, si ça te gêne de bondir, t'approcher, tendre ta joue à ton père et lui dire, câline : Papa, ça me ferait plaisir d'épouser M. Paul Roland. Tu ne pourrais pas? (*M. Lepic paraît.*) Veux-tu que je te montre?

HENRIETTE. — Je vais mettre mon chapeau.

Elle se sauve.

MAGDALENO. — Iru meti vian ĉapelon kaj ni iru al vespro, tio distros vin.

HENRIETO. — Tio ne plu faras al mi iun ajn bonon. Vi scias kiel mi amas s-ro pastro, kiel mi absolute fidas lin. Nu, mia fido nebuliĝas, kaj en la preĝejo, de kelkaj tagoj, mi maŝine preĝas; mi ne plu preĝas, mi revaĉas, mi pensas pri fidaktoj kiujn la viroj ne povas aŭ ne volas kompreni.

MAGDALENO. — Ili povus. Ili ne volas. Tio estas virinaj kaj pastraj aferoj, tio ne koncernas la virojn.

HENRIETO. — Kial Magdaleno?

MAGDALENO. — Tio estas al ili tutegala. Mia patro, li, prifajfas tion!

HENRIETO. — La mia, ne.

MAGDALENO. — Li tamen havas malmolan kapon, via patro!

HENRIETO. — Eble estas tie la malfeliĉo!

MAGDALENO. — Henrieto, vi ricevis tro da premioj kiam vi estis en lernpensiono! Ĉu vi volas konsilon de via kara amikino? Vi scias kiel paĉjo estas por mi tenera. Nu! mi faros al vi konfidencon kiu mirigos vin: okazas ke li, kiel aliaj, paŭtas.

HENRIETO, *ironia*. — Ho! Tio estas grava!

MAGDALENO. — Tio suferigas min. Ne estas nur vi sentema! Sed ekde kiam mi vidas lin paŭti, mi kalkulas nek unu nek du, mi saltas al lia kolo, kaj al ĝi pendadas, ĝis kiam li malpaŭtas, kaj tio ne estas longa!...

HENRIETO. — Salti al la kolo de paĉjo!

MAGDALENO. — Vi vidus la rezulton!

HENRIETO. — Al la kolo de paĉjo! Magdaleno!

MAGDALENO. — Jes ja ! Kion! Tio ne estas la kampanilo!

HENRIETO. — Mi preferus salti en la riveron!

MAGDALENO. — Estas larĝe tempo ke vi edziniĝu!... Ĉu vi ne povas, se salti ĝenas vin, alproksimiĝi, oferi vian vangon al via patro, kaj diri al li, kaĵolanta : Paĉjo, plezurigus min, edziniĝi kun s-ro Paŭlo Rolando. Ĉu vi ne povus? (*S-ro Lepiko aperas.*) Ĉu vi deziras ke mi montru al vi ?

HENRIETO. — Mi iras meti mian ĉapelon.

Ŝi forfuĝas.

SCÈNE VI

MADELEINE, MONSIEUR LEPIC

MONSIEUR LEPIC. — Te voilà, toi ?

MADELEINE. — Oui, bonjour, monsieur Lepic.

MONSIEUR LEPIC. — Bonjour, Madeleine !

MADELEINE. — Ça va bien ?

MONSIEUR LEPIC. — Ça va comme les vieux.

MADELEINE. — Vous êtes encore jeune.

MONSIEUR LEPIC — Pas tant que toi.

MADELEINE. — Chacun son tour !

MONSIEUR LEPIC. — Et pas si joli !

MADELEINE. — Je suis donc jolie ?

MONSIEUR LEPIC — Je ne te le répéterai pas.

MADELEINE. — Ah ! j'ai mis ma belle robe bleue du dimanche.

MONSIEUR LEPIC. — Elle te va bien. Ce n'était pas pour venir me voir.

MADELEINE. — Si, après la messe.

MONSIEUR LEPIC. — Tu y est allée ?

MADELEINE. — Je ne la manque jamais.

MONSIEUR LEPIC. — Et tu l'as vu ?

MADELEINE. — Qui ça ?

MONSIEUR LEPIC. — M. le curé !

MADELEINE. — Oui.

MONSIEUR LEPIC. — Il était à la messe ?

MADELEINE. — Ça vous étonne ?

MONSIEUR LEPIC. — De lui non. Qu'est-ce qu'il t'a dit ?

MADELEINE. — Il m'a dit: *Pax vobiscum!* En latin.

MONSIEUR LEPIC. — Il ne sait donc pas le français ?

MADELEINE. — Et je le reverrai tout à l'heure, aux vêpres.

MONSIEUR LEPIC. — Il y va aussi ?

SCENO VI

MAGDALENO, SINJORO LEPIKO

SINJORO LEPIKO. — Jen ĉu vi ?

MAGDALENO. — Jes, bonan tagon, sinjoro Lepiko.

SINJORO LEPIKO. — Bonan tagon, Magdaleno !

MAGDALENO. — Ĉu bone ?

SINJORO LEPIKO. — Mi fartas kiel aĝuloj.

MAGDALENO. — Vi estas ankoraŭ juna.

SINJORO LEPIKO. — Ne tiom kiom vi.

MAGDALENO. — Ĉiu laŭvice.

SINJORO LEPIKO. — Kaj ne tiel beleta !

MAGDALENO. — Ĉu mi do estas beleta ?

SINJORO LEPIKO. — Mi ne ripetos tion al vi.

MAGDALENO. — Ha ! Mi metis mian belan bluan dimanĉan robon.

SINJORO LEPIKO. — Ĝi belaspektas sur vi. Tio ne estis por viziti min.

MAGDALENO. — Jes, post la meso.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu vi ĉeestis ?

MAGDALENO. — Mi neniam mankas ĝin.

SINJORO LEPIKO. — Kaj ĉu vi vidis lin ?

MAGDALENO. — Kiu ?

SINJORO LEPIKO. — S-ro pastro !

MAGDALENO. — Jes.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu li ĉeestis la meson ?

MAGDALENO. — Ĉu tio mirigas vin ?

SINJORO LEPIKO. — De li, ne. Kion li diris al vi ?

MAGDALENO. — Li diris al mi: *Pax vobiscum!* Latine.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu li do ne scias la francan ?

MAGDALENO. — Kaj mi revidos lin, baldaŭ, dum la vespro.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu li ankaŭ ĉeestos ?

MADELEINE. — Il fait son métier. Qu'est-ce que je lui dirai de votre part?

MONSIEUR LEPIC. — Ce que tu voudras: fichez-nous la paix, en français.

MADELEINE. — Oh, vilain! Faudra t-il lui annoncer la grande nouvelle?

MONSIEUR LEPIC. — Tu en connais une?

MADELEINE. — Oui, vous voulez la savoir?

MONSIEUR LEPIC. — Je n'y tiens pas.

MADELEINE. — Je vous la dis tout de même. M. Paul Roland va venir aujourd'hui, à quatre heures, avec sa tante, Mme Bâche. Il vous demandera la main de mon amie Henriette, et vous la lui accorderez. Voilà !

MONSIEUR LEPIC. — C'est intéressant.

MADELEINE. — Je suis bien renseignée ?

MONSIEUR LEPIC — Tu en as l'air.

MADELEINE. — N'est-ce pas que vous direz : oui? N'est-ce pas? Qui ne dit rien, consent.

MONSIEUR LEPIC. — Qui ne dit rien, ne dit rien.

MADELEINE. — Répondez gentiment.

MONSIEUR LEPIC. — Qu'est-ce que tu me conseilles ?

MADELEINE. — Oh ! comme c'est fort ! Bien sûr, ça ne me regarde pas.

MONSIEUR LEPIC. — On ne le dirait guère.

MADELEINE. — Si, ça me regarde! Henriette n'est-elle pas ma grande amie? la seule. Après son mariage, le mien! qu'elle se dépêche ! Vous direz oui, hein! sans vous faire prier. Il ne veut pas répondre... (*Elle lui touche le front.*) Oh! qu'est-ce qu'il y a là?

MONSIEUR LEPIC. — Un os, l'os du front.

MADELEINE. — Dites oui, je vous en prie.

MONSIEUR LEPIC — Ce n'est pas moi, un homme, qu'il faut prier, c'est...

Il désigne le ciel du doigt.

MADELEINE. — Dieu! Je le prie chaque jour! Dites oui, et vous aurez la meilleure place dans mes autres prières.

MAGDALENO. — Li faras sian profesion. Kion mi diros de vi al li ?

SINJORO LEPIKO. — Tion kion vi dezoros: lasu al ni pacon, en la franca.

MAGDALENO. — Ho, maliculo! Ĉu necesos anonci al li la grandan novaĵon?

SINJORO LEPIKO. — Ĉu vi konas iun?

MAGDALENO. — Jes, ĉu vi volas koni ĝin?

SINJORO LEPIKO. — Mi ne tro deziras tion.

MAGDALENO. — Tamen mi diras al vi tion. S-ro Paŭlo Rolando venos hodiaŭ, je la kvara, kun sia onklino, s-ino Baŝo. Li petos de vi la manon de mia amikino Henrieto, kaj vi koncedos ĝin al li. Jen!

SINJORO LEPIKO. — Tio estas interesa.

MAGDALENO. — Ĉu mi estas bone informita?

SINJORO LEPIKO. — Ŝajnas al mi ke jes.

MAGDALENO. — Ĉu ne vi diros: jes? Ĉu ne? Kiu nenion diras, jesas.

SINJORO LEPIKO. — Kiu nenion diras, diras nenion.

MAGDALENO. — Afable respondu.

SINJORO LEPIKO. — Kion vi konsilas al mi?

MAGDALENO. — Ho! Vi troigas! Kompreneble, tio ne koncernas min.

SINJORO LEPIKO. — Oni tion ne dirus.

MAGDALENO. — Jes ja, tio koncernas min! Ĉu Henrieto ne estas mia granda amikino? La nura. Post ŝia edziniĝo, mia! Ke ŝi rapidu! Vi jesos, ĉu? Sen esti petata. Li ne volas respondi... (*Ŝi tuŝas lian frunton.*) Ho! Kio estas tie?

SINJORO LEPIKO. — Osto, la frunta ostoj.

MAGDALENO. — Jesu, mi petas vin.

SINJORO LEPIKO. — Ne min, homon, vi devas peti, sed...

Li montras ĉielon per fingro.

MAGDALENO. — Dio! Mi petas lin ĉiutage! Jesu, kaj vi havos la plej bonan lokon en miaj aliaj preĝoj.

Elle désigne son livre.

MONSIEUR LEPIC. — La meilleure, et ton amoureux ? — Qu'est-ce que c'est que ça ?

MADELEINE. — Je n'ai pas d'amoureux. Je n'ai que votre Félix, il ne compte pas ! — Ça, c'est mon livre.

MONSIEUR LEPIC. — Un roman ?

MADELEINE. — Mon livre de prières. J'aurai un vrai amoureux, quand ce sera mon tour.

MONSIEUR LEPIC. — Dépêche-toi.

MADELEINE. — Quand Henriette sera mariée, dès le lendemain, je vous le promets.

MONSIEUR LEPIC. — Il y a déjà peut-être là-dedans sa photographie !

MADELEINE, *offrant le livre.* — Voyez, je vous le prête. Ouvrez, cherchez !

MONSIEUR LEPIC. — Ton livre ! Je le connais mieux que toi.

MADELEINE. — Un fameux !

MONSIEUR LEPIC. — Veux-tu parier ?

MADELEINE. — Vous n'en réciteriez pas une ligne.

MONSIEUR LEPIC. — Deux.

MADELEINE. — Allons !

MONSIEUR LEPIC. —
« Faux témoignage ne diras
« Ni mentiras aucunement. »

MADELEINE. — Très bien, après ?

MONSIEUR LEPIC. — Continue, toi. (*Madeleine cherche.*) Tu ne te rappelles plus ?

MADELEINE, *reprend le livre.* — Ma foi non.
« L'œuvre de chair ne désireras
« Qu'en mariage seulement. »

MONSIEUR LEPIC - Eh bien ?

MADELEINE. — Eh bien, quoi ?

Ŝi montras sian libron.

SINJORO LEPIKO. — La plej bonan, kaj via amanto, ĉu ? — Kio estas tio ?

MAGDALENO. — Mi ne havas amanton. Mi nur havas vian Felikson, lin mi ne kalkulas ! — Tio ? Tio estas mia libro.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu romano ?

MAGDALENO. — Mia preĝlibro. Mi havos veran amanton, kiam estos mia vico.

SINJORO LEPIKO. — Rapidu.

MAGDALENO. — Kiam Henrieto estos edzino, ek de la morgaŭo, mi promesas al vi.

SINJORO LEPIKO. — Eble jam estas en tiu lia fotografio !

MAGDALENO, *donante la libron.* — Vidu, mi pruntedonas ĝin al vi. Malfermu, serĉu !

SINJORO LEPIKO. — Vian libron ! Mi konas ĝin pli bone ol vi.

MAGDALENO. — Famega !

SINJORO LEPIKO. — Ĉu vi volas veti ?

MAGDALENO. — Vi de ĝi eĉ ne unu linion recitus.

SINJORO LEPIKO. — Du.

MAGDALENO. — Iru pli !

SINJORO LEPIKO. —

"Falsa atesto ne diru

"Nek iam mensogu.

MAGDALENO. — Tre bone, kaj poste ?

SINJORO LEPIKO. — Daŭrigu vi. (*Magdaleno serĉas.*) Ĉu vi ne plu memoras ?

MAGDALENO, *reprenas la libron.* — Verdire ne.

"Intiman korprilaton deziru

"Nur en la edziĝeco.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu do ?

MAGDALENO. — Ĉu do, kion ?

MONSIEUR LEPIC. — Tu as compris?

MADELEINE, *gênée*. — Un peu.

MONSIEUR LEPIC. — M. le curé t'explique?

MADELEINE. — Sans insister.

MONSIEUR LEPIC. — C'est pourtant raide !

MADELEINE. — Vous choisissez exprès !

MONSIEUR LEPIC *reprend le livre*. — Il y en a d'autres :
« Luxurieux point ne seras... »

MADELEINE. — Assez ! Assez ! Élève Lepic ! Vous savez encore votre catéchisme.

MONSIEUR LEPIC. — Pourquoi rougis-tu?

MADELEINE. — Parce que vous êtes méchant, et que vous me faites de la peine !

MONSIEUR LEPIC. — Pauvre petite ? Ça pourrait être un si beau livre ! Tu ne feras pas mal de lire quelques poètes, pour te purifier.

MADELEINE. — J'en lirai avec Henriette, quand nous serons mariées.

MONSIEUR LEPIC. — Trop tard !

MADELEINE. — Nous nous rattraperons. Au revoir... Malgré vos malices de païen, je vous aime bien.

MONSIEUR LEPIC. — Moi aussi.

MADELEINE. — Oh ! vous, vous m'adorez !

MONSIEUR LEPIC. — Oh ! oh !

MADELEINE. — C'est vous qui me l'avez dit.

MONSIEUR LEPIC. — Tu m'étonnes. Je ne me sers pas de ce mot-là aussi facilement que tes écrivains.

MADELEINE. — Vous ne m'avez pas dit que vous m'aimiez ?

MONSIEUR LEPIC. — Ça, c'est possible.

MADELEINE. — Vous me détestez, alors?

MONSIEUR LEPIC. — Comme tu raisones bien !

MADELEINE. — Vous n'aimez personne?

MONSIEUR LEPIC. — Mais si.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu vi komprenis?

MAGDALENO, *ĝenata*. — Iomete.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu s-ro pastro klarigas al vi?

MAGDALENO. — Sen insisti.

SINJORO LEPIKO. — Tio estas tamen neakceptebla!

MAGDALENO. — Vi elektas intence!

SINJORO LEPIKO *reprenas la libron*. — Estas aliaj :
"Ne estu voluptamema..."

MAGDALENO. — Sufiĉas! Sufiĉas! Lernanto Lepiko! Vi ankoraŭ scias vian kateĥismon.

SINJORO LEPIKO. — Kial vi ruĝiĝas?

MAGDALENO. — Ĉar vi estas malbona kaj vi ĉagrenas min!

SINJORO LEPIKO. — Kompatinda etulino! Tio povus esti tiel bela libro! Utilus al vi legi kelkajn poetojn por pekliberiĝi.

MAGDALENO. — Mi legos ilin kun Henrieto kiam ni estos edzinoj.

SINJORO LEPIKO. — Tro malfrue!

MAGDALENO. — Ni kompensas la malfruon. Ĝis revido... Malgraŭ viaj spritaĉaĵoj de pagano, mi ŝatas vin.

SINJORO LEPIKO. — Ankaŭ mi.

MAGDALENO. — Ho vi! Vi amegas min!

SINJORO LEPIKO. — Ho! Ho!

MAGDALENO. — Estas vi kiu tion diris al mi.

SINJORO LEPIKO. — Vi mirigas min. Mi ne uzas tiun vorton tiel facile kiel viaj beletristoj.

MAGDALENO. — Ĉu vi ne diris al mi ke vi amas min ?

SINJORO LEPIKO. — Tio, jes, eblas.

MAGDALENO. — Ĉu vi do malamas min?

SINJORO LEPIKO. — Kiel bone vi rezonas!

MAGDALENO. — Ĉu nenium vi amas?

SINJORO LEPIKO. — Sed jes!

MADELEINE. — Qui donc?

MONSIEUR LEPIC, *gaiement*. — Ma petite amie.

MADELEINE. — Vous en avez une?

MONSIEUR LEPIC. — Tiens !...

MADELEINE. — À votre âge !

MONSIEUR LEPIC. — Elle est si jeune, que ça compense.

MADELEINE, *très curieuse*. — Comment s'appelle-t-elle? Son petit nom?

MONSIEUR LEPIC. — Madeleine.

MADELEINE. — Comme moi. Et son nom de famille ?

MONSIEUR LEPIC — Bertier.

MADELEINE. — Madeleine Bertier, moi !

MONSIEUR LEPIC. — Dame !

MADELEINE. — Oh ! quelle farce ! Ce n'est pas ce que je voulais dire. Je croyais que vous parliez d'une autre, je pensais à une vraie.

MONSIEUR LEPIC. — Tu ne penses qu'au mal !

MADELEINE. — Bien sûr qu'on s'aime tous deux, et je vous répète que je vous aime beaucoup.

MONSIEUR LEPIC. — Le dis-tu à M. le curé ?

MADELEINE. — Je lui dit tout.

MONSIEUR LEPIC. — Tu diras le reste à ton mari.

MADELEINE. — Est-il mauvais donc ! Ah ! vous ne vous êtes pas levé du bon côté, ce matin.

MONSIEUR LEPIC. — C'était dimanche.

MADELEINE. — Au revoir, monsieur Lepic.

MONSIEUR LEPIC. — Au revoir, ma fille !

MADELEINE. — Oh ! si j'étais votre fille !

MONSIEUR LEPIC. — Ça se gênerait peut-être.

MADELEINE. — Pourquoi ? Au fait, c'est à votre fille que vous devriez dire tout ça.

MONSIEUR LEPIC. — J'en suis las !

MAGDALENO. — Do kiun?

SINJORO LEPIKO *gaje*. — Mian koramikinon.

MAGDALENO. — Ĉu vi havas iun?

SINJORO LEPIKO. — Certe!

MAGDALENO. — En via aĝo!

SINJORO LEPIKO. — Ŝi estas tiel juna, ke tio kompensas.

MAGDALENO, *kuriozega*. — Kiel ŝi nomiĝas? Ŝia karesnomo?

SINJORO LEPIKO. — Magdaleno.

MAGDALENO. — Kiel mi. Kaj ŝia familia nomo?

SINJORO LEPIKO. — Bertier.

MAGDALENO. — Magdaleno Bertier, mi!

SINJORO LEPIKO. — Certe!

MAGDALENO. — Ho! Kia ŝerco! Ne estas tio kion mi volis diri. Mi pensis ke vi parolis pri iu alia, mi pensis pri vera.

SINJORO LEPIKO. — Vi nur pensas pri malbonaĵo!

MAGDALENO. — Certe ni amas unu la alian, kaj mi al vi ripetas ke mi multe amas vin.

SINJORO LEPIKO. — Ĉu vi diris tion al s-ro pastro?

MAGDALENO. — Ĉion mi diras al li.

SINJORO LEPIKO. — Vi diros la ceteron al via edzo.

MAGDALENO. — Kiel malplaĉa do! Ha! Vi leviĝis ne sur la bona flanko, hodiaŭ matene.

SINJORO LEPIKO. — Estis dimanĉo.

MAGDALENO. — Ĝis la revido, sinjoro Lepiko.

SINJORO LEPIKO. — Ĝis la revido, kara filino!

MAGDALENO. — Ho! Se mi estus via filino!

SINJORO LEPIKO. — Tio eble malboniĝus.

MAGDALENO. — Kial? Cetere, al via filino vi devus ĉion tion diri.

SINJORO LEPIKO. — Mi estas laca pri tio!

MADELEINE. — Vous ne lui dites peut-être pas bien comme à moi.

MONSIEUR LEPIC. — Ah ! dis-le lui toi-même, répète-le, puisque tu te mêles de tout.

MADELEINE. — C'est ce que je m'en vais faire, à l'instant, aux vêpres.

MONSIEUR LEPIC. — Ce ne sera pas du temps perdu...

MADELEINE. — Allons, embrassez-moi. (*Elle lui tend la joue...*) Sur l'autre. (*À Henriette qui revient.*) Tu vois...

HENRIETTE. — Au revoir, papa ! (*Elle lui donne avec timidité un baiser que M. Lepic garde.* — *À Madeleine.*) Tu vois !

MADELEINE. — Ton fiancé te le rendra ce soir !

Sonnerie de cloches pour le départ ! M. Lepic se bouche une oreille du creux de la main. Les trois dames, Mme Lepic au milieu, sont sur un rang, avec les trois livres de messe.

MADAME LEPIC. — Vous y êtes, nous partons ?

Énormité du livre de Mme Lepic ; le livre de Mme Lepic tombe.

MONSIEUR LEPIC — Pouf !...

MADAME LEPIC. — Allez devant, mes filles, je vous rejoins.

Elle ramasse son livre. M. Lepic va décrocher son fusil. Mme Lepic, qui est restée en arrière, feint d'essayer son livre, et observe avec stupeur M. Lepic.

SCÈNE VII

MONSIEUR LEPIC, MADAME LEPIC

MADAME LEPIC. — Tu sors, mon ami?... tu sors?... Tu as bien lu la lettre de M. Paul Roland?... Tu cherches des allumettes? En voilà une boîte de petites que j'ai achetées pour toi. C'est moins lourd dans la poche.

(M. Lepic prend une autre boîte d'allumettes sur la cheminée et il se bouche encore l'oreille. Mme Lepic continuant.) Avec ces cloches, on ne s'entend pas ! (*Elle ferme la fenêtre.*) M. Paul et sa tante seront là à quatre heures... Veux-tu cette table, attends que je te débarrasse. (*M. Lepic appuie son fusil sur une autre table et l'ouvre; par les canons il cherche la lumière et rencontre Mme Lepic.*) À quatre heures précises. Tu seras là. Oui, tu ne vas pas loin ? (*M. Lepic et Mme Lepic se heurtent. Passage difficile.*

M Lepic reste immobile et attend.) Un petit tour seulement ? Ce n'est pas la peine de mettre tes guêtres. (*M. Lepic met ses guêtres.*) Veux-tu que je te prépare une chemise propre pour les recevoir? Tu n'as pas besoin de t'habiller, mais ce serait une occasion d'essayer tes chemises neuves... Ton

MAGDALENO. — Vi eble al li ne tiel bone diras kiel al mi.

SINJORO LEPIKO. — Ha! Diru tion al li vi mem, ripetu tion, ĉar vi enmiksiĝas en ĉion.

MAGDALENO. — Estas tio kion mi faros, tuj, dum la vespro.

SINJORO LEPIKO. — Tio ne estos perdita tempo...

MAGDALENO. — Do, kisu min. (*Ŝi alproksimigas al li la vangon...*) Sur la alian. (*Al Henrieto kiu revenas.*) Vi vidas...

HENRIETO. — Ĝis la revido, paĉjo! (*Ŝi timeme donas al li kison kiun s-ro Lepiko ne redonas.* — *Al Magdaleno.*) Vi vidas!

MAGDALENO. — Via fianĉo redonos ĝin al vi hodiaŭ vespere!

Bruo de sonoriloj por la ekiro! S-ro Lepiko ŝtopas unu orelon per la polmo. La tri virinoj, s-ino Lepiko meze, laŭvice, kun la tri meslibroj.

SINJORINO LEPIKO. — Vi estas pretaj, ĉu ni ekiros?

Egeco de la libro de s-ino Lepiko; la libro de s-rino Lepiko falas.

SINJORO LEPIKO. — Puf!...

SINJORINO LEPIKO. — Iru antaŭen, miaj fraŭlinoj, mi tuj venos.

Ŝi levprenas sian libron. S-ro Lepiko iras dekroĉi sian fusilon. S-ino Lepiko, kiu restis malantaŭe, simulas viŝi sian libron, kaj stupore observas s-ron Lepikon.

SEPA SCENO

SINJORO LEPIKO, SINJORINO LEPIKO

SINJORINO LEPIKO. — Ĉu vi eliras, amiko mia?... Ĉu vi eliras?... Ĉu vi ja legis la leteron de s-ro Paŭlo Rolando?... Ĉu vi serĉas alumetojn? Jen skatolo de malgrandaj kiujn mi aĉetis por vi. Tio estas malpli peza en la poŝo. (*S-ro Lepiko prenas alian alumetskatolon sur la kameno kaj li denove ŝtopas sian orelon, s-ino Lepiko daŭrigante.*) Pro la sonoriloj, oni aŭdas nenion! (*Ŝi fermas la fenestron.*) S-ro Paŭlo kaj lia onklino ĉeestos je la kvara... Ĉu vi volas tiun tablon? Atendu ke mi liberigu ĝin. (*S-ro Lepiko apogas sian fusilon sur alia tablo kaj malfermas ĝin; tra la tuboj li serĉas la lumon kaj trovas s-iron Lepikon.*) Je la kvara precize. Vi ĉeestos. Jes, vi ne malproksime iras, ĉu ne? (*S-ro Lepiko kaj s-ino Lepiko kolizias. Malfacila situacio. S-ro Lepiko staras senmove kaj atendas.*) Nur promeneto, ĉu ne? Ne necesas meti viajn gamaŝojn. (*S-ro Lepiko metas siajn gamaŝojn.*) Ĉu vi volas ke mi preparu al vi puran ĉemizon por akcepti ilin? Vi ne bezonas alivestiĝi, sed estus okazo provi viajn novajn

chapeau de paille, par ce soleil? (*M. Lepic prend son chapeau de feutre.*)
Oh ! ces cloches ! (*Elle ferme la porte.*) À quatre heures, quatre heures et quart. Nous ne sommes pas à un quart d'heure près... D'ailleurs nous t'attendrons. Au revoir mon ami ! Si tu pouvais nous rapporter un petit oiseau pour notre dîner !

M. Lepic sort. Les cloches rentrent.

SCÈNE VIII

MADAME LEPIC, *seule.*

MADAME LEPIC. — Oh ! tête de fer ! pas un mot. Pas même : tu m'ennuies ! Et c'est comme ça depuis vingt-sept ans ! Et ma fille va se marier !

Elle sort avec dignité, au son des cloches.

ACTE DEUXIÈME

Même décor qu'au premier acte. — Après vêpres.

SCÈNE PREMIÈRE

MADAME LEPIC, HENRIETTE, *retour de vêpres*, FELIX, PAUL ROLAND, TANTE BÂCHE.

MADAME LEPIC *regarde l'horloge.* — Il sera là dans un quart d'heure. Il me l'a bien promis.

FÉLIX, *ironique.* — Oh ! Formellement ?

MADAME LEPIC. — Il était de si bonne humeur qu'il m'a dit en partant : Je tâcherai de te rapporter un petit oiseau qui t'ouvre l'appétit.

FÉLIX. — Il t'a dit ça ?

MADAME LEPIC. — Oui, ça t'étonne ? Il fallait être là, tu l'aurais entendu !

TANTE BÂCHE, *agitée.* — Nous sommes tranquilles. M. Lepic est un homme du monde !

MADAME LEPIC. — Surtout avec les étrangers.

TANTE BÂCHE. — D'une politesse ! Froid, mais si comme il faut ! Et quel grand air !

MADAME LEPIC. — Et si vous l'aviez vu danser !

TANTE BÂCHE. — Oh ! je le vois !

ĉemizojn... Via pajlĉapelo, pro la suno, ĉu ne? (*S-ro Lepiko prenas sian feltan ĉapelon.*) Ho! Tiuj sonoriloj! (*Ŝi fermas la pordon.*) Je la kvara, la kvara kaj dekkvin. Unu kvarono ne ĝenus nin... Cetere ni atendos vin. Ĝis la revido, amiko mia! Se vi povus alporti al ni birdeton por nia vespermanĝo!

S-ro Lepiko eliras. La sonorilojn reeniras.

LA OKA SCENO

SINJORINO LEPIKO, *sola.*

SINJORINO LEPIKO. — Ho! Ferkapulo! Neniu vorto. Eĉ ne: vi tedas min! Kaj estas tiel jam de dudek sep jaroj! Kaj mia filino baldaŭ edziniĝos!

Ŝi digne eliras, kun sonorila sono.

DUA AKTO

MAGDALENO, *frapas al la fenestro; Paŭlo malfermas*. — Ĉu vi finis ? Mi ja volus scii! Ĉu farita ?

PAŬLO — Jes fraŭlino. Kie estas f-ino Henrieto?

MAGDALENO — Tie fore, ĉe la fundo de la fruktoĝardeno.

FELIKSO. — Kun panjo kiu diras siajn preĝojn rapidege. (*Al Paŭlo.*) Mia kara bofrato, mi sciis ke tio glate sukcesos.

MAGDALENO — Ho ! Kiel kontenta mi estas! Tio ja estas bona, sinjoro Lepiko! Necesas ke mi kisu vin.

Ŝi superpaŝas la fenestron, sekvita de Felikso.

SINJORO LEPIKO. — Sed ankaraŭ ne pri vi temas, honorfraŭlino! (*li kisas ŝin*). Ŝi estas afableta. Bedaŭrinde, kiel la aliulinoj, ŝi emas esti kun pastroj!

MAGDALENO. — Jen li rekomencas, kiel ĉimatene!

SINJORO LEPIKO. — Ha! Ankaŭ vi, vi tedos vian edzon, kun via pastro!

MAGDALENO. — Felikso, via paĉjo antaŭkompatas pri via sorto? Ĉu ne, vi estos feliĉa fari ĉion kion mi volos kiam ni estos edziĝintaj?

FELIKSO. — Nenio urĝas.

MAGDALENO. — Tute lia patro!

FELIKSO. — Do, mi faros ĉion kiel paĉjo.

PAUL, à *M. Lepic*. — Celui-là, au moins !

MONSIEUR LEPIC. — Oh ! celui-là ne m'a donné aucun mal et il me dépasse !

FÉLIX. — Oh ! papa, je ne fais que te suivre ! Tu ne vas pas caner ?

MONSIEUR LEPIC, à *Félix*. — Triste modèle que ton papa, mon garçon ! Malheur à toi, si tu ne prends pas garde à la fleur poussée à l'ombre du clocher !

MADELEINE. — Oh ! que c'est joli ! C'est moi la fleur ! Ne dirait-on pas que je ferai une vieille bigote. J'aime M. le curé, comme je vous aime, vous, faute de mieux ; je ne peux pourtant pas vous épouser.

MONSIEUR LEPIC. — Moi non plus ! Je le regrette. Le curé pourrait, lui. Il est libre.

MADELEINE. — La messe, les vêpres, vous savez bien, mon vieil ami, que c'est une distraction, un prétexte pour essayer une toilette. Quand j'ai un chapeau neuf, j'arrive toujours en retard à l'église ; ça fait un effet ! Le curé, monsieur Paul, ça occupe. C'est pour attendre le mari. Dès qu'on a le mari, on lâche le curé.

MONSIEUR LEPIC. — On y retourne.

MADELEINE. — Ah ! si on devient trop malheureuse ! Nous ne voulons qu'être heureuses, nous, et nous sommes toutes comme ça ; Henriette aussi, que j'oublie, qui se morfond là-bas, sous son pommier. Je cours la chercher.

PAUL. — Moi aussi.

MADELEINE. — Venez, par la fenêtre. Félix, amenez les autres... (À *M. Lepic*.) Elle va vous sauter au cou. (*Importante*.) Oh ! nous avons causé toutes les deux ! Je l'ai sermonnée ! Tenez-vous bien !

MONSIEUR LEPIC. — Je me tiendrai.

MADELEINE, *de la fenêtre*. — Oui, sérieusement ! Qu'est-ce que vous voulez qu'on fasse, ici, dans ce trou, le dimanche. Ah ! vous êtes cloué !

FÉLIX, *autoritaire*. — Avec moi, le dimanche, vous viendrez à la pêche.

MADELEINE. — Mais je n'aime pas ça !

FÉLIX. — Qu'est-ce que vous aimez ! La femme doit suivre son mari à la pêche.

MADELEINE. — Et quand la pêche sera fermée ?

FÉLIX. — On se promènera au bord de l'eau.

MADELEINE. — Toute la journée ?

PAŬLO, *al s-ro Lepiko* — Tiu ĉi, almenaŭ!

SINJORO LEPIKO. — Ho! Tiu ĉi donis al mi neniun malfacilaĵon kaj li superas min!

FELIKSO. — Ho! Paĉjo, mi nur sekvas vin! Vi ne timaĉos?

SINJORO LEPIKO, *al Felikso*. — Kia bedaŭrinda modelo tia patro, mia filo! Malfeliĉo al vi, se vi ne atentos pri la floro kreskinta ĉe la ombro de la sonorilejo!

MAGDALENO. — Ho! Kiel tio estas bela! Tio estas mi la floro! Ĉu oni ne dirus ke mi estiĝos maljuna bigotino. Mi amas s-ron Pastron, kiel mi vin amas, vin, anstataŭ ion pli bonan; tamen mi ne povas edzigi vin.

SINJORO LEPIKO. — Ankaŭ mi ne ! Mi tion bedaŭras. La pastro, li, povus, li estas libera.

MAGDALENO. — La meso, la vespro, vi bone scias, mia kara amiko, ke tio estas distraĵo, preteksto por provi novan vestaĵon. Kiam mi havas novan ĉapelon, mi ĉiam malfruas al la preĝejo; tio faras efekton! La pastro, sinjoro Paŭlo, tio okupas. Tio estas por atendi la edzon. Tuj kiam oni havas la edzon, oni forlasas la pastron.

SINJORO LEPIKO. — Oni reiras al li.

MAGDALENO. — Ha! Se oni iĝas tro mafeliĉa! Ni volas esti nur feliĉaj, ni, kaj ni estas ĉiuj tiaj: ankaŭ Henrieto, kiun mi forgesas, kiu enuegas tie, sub sia pomarbo. Mi kuras serĉi ŝin.

PAŬLO. — Ankaŭ mi.

MAGDALENO. — Venu, tra la fenestro. Felikso, alkonduku la aliajn... (*Al s-ro Lepiko*.) Ŝi eksaltos al via kolo. (*Grava*.) Ho! Ni ambaŭ interparolis! Mi moralinstruis ŝin! Tenu vin bone!

SINJORO LEPIKO. — Mi min tenos.

MAGDALENO, *el la fenestro*. — Jes, serioze! Kion vi volas ke oni faru, ĉi tie, en tiu truo, dimanĉe. Ha! vi estas alnajlita!

FELIKSO, *aŭtoritema*. — Kun mi, dimanĉe, vi venos fiŝkapti.

MAGDALENO. — Sed tion mi ne ŝatas!

FELIKSO. — Kion vi ŝatas! La edzino devas sekvi sian edzon al la fiŝkaptado.

MAGDALENO. — Kaj kiam la fiŝkaptadsezono estos fermita?

FELIKSO. — Ni promenados sur la akvobordo.

MAGDALENO. — Ĉu tuttage?

FÉLIX. — Tout le long de la rivière.

MADELEINE. — Et s'il fait mauvais temps ?

FÉLIX. — On restera au lit.

Madeleine se sauve.

FÉLIX, à Paul, dont il serre la main. — C'est votre mariage qui me met en goût, mon cher beau-frère. Je suis très content !... Je vais écrire à Poil de Carotte !

Tous les trois sortent par la fenêtre. Paul enjambe le dernier. La porte d'en face s'ouvre. Mme Lepic apparaît. On aperçoit Henriette derrière elle.

SCÈNE VIII

MONSIEUR LEPIC, MADAME LEPIC, HENRIETTE

MADAME LEPIC, *stupéfaite*. — Comment ? Il se sauve par la fenêtre, celui-là ! C'est un comble ! Alors, c'est encore non ? (*Figure impassible de M. Lepic.*) Tu refuses encore ? Et nous ne saurons pas encore pourquoi. Enfin, qu'est-ce que tu lui as dit, à cet homme, pour qu'il ne prenne même pas la peine de sortir comme les autres, poliment, par la porte. Tu ne veux pas me répondre ? Viens Henriette ! Tu peux entrer. C'est fini ! Grâce à ton père tu ne te marieras jamais ! Voilà, ma fille, voilà ton père ! Ce n'est pas un homme, c'est un original, un maniaque ! Et il rit, c'est un monstre ! Que veux-tu que j'y fasse ? À ta place, moi, je me passerais de sa permission, mais tu t'obstines à le respecter ! Tu vois ce que ça te rapporte. Et moi qui te conseillais de faire, quelques jours, des sacrifices sur la question religieuse. Voilà notre récompense ! Dieu n'est pas long à nous punir. Reste si tu veux ; je n'ai plus rien à faire ici. J'aime mieux m'en aller et mourir, si la mort veut de moi ! (*Elle sort.*) Seigneur, ne laisserez-vous pas tomber enfin sur moi un regard de miséricorde !

SCÈNE IX

MONSIEUR LEPIC, HENRIETTE

HENRIETTE. — Oh ! papa, moi qui t'aime tant, je te supplie à genoux de me le dire : qu'est-ce que j'ai fait, pourquoi me traites-tu si durement ? M. Paul et moi, nous nous aimions. Ma vie est brisée !

MONSIEUR LEPIC *la relève*. — Mais, ma fille, ton fiancé te cherche dans le jardin.

HENRIETTE. — Ah !... Et ma mère qui s'imagine !...

MONSIEUR LEPIC. — Je n'ai rien dit.

FELIKSO. — Sur la tuta longeco de la rivero.

MAGDALENO. — Kaj se la vetero estos malbela?

FELIKSO. — Ni restos enlite.

Magdaleno forfuĝas.

FELIKSO, *al Paŭlo, kies manon li premas*. — Estas via edziĝo kiu interesigas min, mia kara bofrato. Mi estas tre kontenta!... Mi skribos al Karotkapo!

Ĉiuj tri eliras tra la fenestro. Paŭlo superpaŝas laste. La fonta pordo malfermiĝas. S-ino Lepiko aperas. Oni ekvidas Henrieton malantaŭ ŝi.

LA OKA SCENO

SINJORO LEPIKO, SINJORINO LEPIKO, HENRIETO

SINJORO LEPIKO, *stuporita*. — Kio? Li forfuĝas tra la fenestro, tiu ĉi! Estas troe! Do, ĉu estas ankoraŭ ne? (*senmova vizaĝo de s-ro Lepiko.*) Ĉu vi ankoraŭ rifuzas? Kaj ni ankoraŭ ne scios kial. Fine, kion vi diris al li, al tiu homo, por ke li eĉ ne klopodu eliri kiel la aliaj, ĝentile, tra la pordo? Ĉu vi ne volas respondi al mi? Venu Henrieto! Vi povas eniri. Estas finite! Danke al via patro vi neniam edziniĝos! Jen, mia filino, jen via patro! Tiu ne estas homo, tiu estas fantaziulo, maniulo! Kaj li ridas, tiu estas monstro! Kion vi volas ke mi ne pri tio faru? Anstataŭ vi, mi, mi ne atendus lian permeson, sed vi obstinas respekti lin! Vi vidas kiel tio profitas al vi. Kaj mi kiu konsilis al vi fari, dum kelkaj tagoj, cedojn pri la religiaĵo. Jen nia rekompenco! Dio ne atendas longe por puni nin. Restu se vi volas; mi havas nenion plu por fari ĉi tie. Mi preferas foriri kaj morti, se la morto volas min! (*Ŝi eliras.*) Dio, ĉu vi ne fine lasos fali sur min kompateman rigardon!

LA NAŬA SCENO

SINJORO LEPIKO, HENRIETO

HENRIETO. — Ho! paĉjo, mi kiu tiom amas vin, mi humile petegas vin diri tion al mi: kion mi faris, kial vi traktas min tiom acerbe? S-ro Paŭlo kaj mi, ni amas unu la alian. Mia vivo estas frakasita!

SINJORO LEPIKO, *starigas ŝin*. — Sed, mia filino, via fianĉo vin serĉas en la ĝardeno.

HENRIETO. — Ha!... Kaj mia patrino kiu imagas!...

SINJORO LEPIKO. — Mi diris nenion.

HENRIETTE. — Oh ! papa, que je suis confuse ! Je te demande pardon.

SCÈNE X

LES MÊMES, TANTE BÂCHE, MADELEINE, FELIX

MADELEINE. — Nous te cherchions partout !

PAUL. — Mademoiselle, vous savez ?

HENRIETTE. — Je sais.

TANTE BÂCHE, *étonnée*. — Puisque c'est oui, où va donc Mme Lepic, comme une folle ! Elle sanglote, elle agite un chapelet au bout de son bras !

HENRIETTE. — Elle n'a pas compris, elle croit que papa refuse. Courez, ma tante !

TANTE BÂCHE. — Comment ? Elle croit ?...

MONSIEUR LEPIC. — Nous nous entendons toujours comme ça.

TANTE BÂCHE, *s'élançant*. — Je la ramène morte ou vive !

PAUL. — Mademoiselle, votre père, qui m'effrayait un peu, a été charmant ! (*À M. Lepic.*) N'est-ce pas ?

MONSIEUR LEPIC. — Ça m'étonne ! Mais puisque vous le dites ! À votre service.

HENRIETTE. — Merci, mon Dieu !

MADELEINE. — Merci, mon Dieu !... Merci, papa !... Va donc, puisque ça y est ! Saute à son cou ! (*À Paul.*) Je la connais mieux que lui ; je l'ai approfondie ! Croyez-moi, elle fera une bonne petite femme !

HENRIETTE, *après avoir embrassé son père qui s'est tout de même penché un peu*. — Oui, papa, j'espère que je ferai une bonne petite femme.

MONSIEUR LEPIC. — C'est possible !

HENRIETTE. — Veux-tu que je te dise comment je m'y prendrai ?

MONSIEUR LEPIC. — Dis toujours !

HENRIETTE. — Je ferai toujours exactement le contraire de ce que j'ai vu faire ici.

MONSIEUR LEPIC. — Excellente idée !

MADELEINE. — Bien répondu, Henriette !

HENRIETTE. — Oh ! si j'osais...

HENRIETO. — Ho! Paĉjo, kiel mi estas konfuzita! Mi petas pardonon de vi.

DEKA SCENO

LA SAMAJ, ONKLINO BAŜO, MAGDALENO, FELIKSO

MAGDALENO. — Ni serĉis vin ĉie!

PAŬLO. — Fraŭlino, ĉu vi scias?

HENRIETO. — Mi scias.

ONKLINO BAŜO, *mirigita*. — Ĉar estas jes, kien do iras s-ino Lepiko, kiel frenezulino! Ŝi ploregas, ŝi agitas rozarion fine de sia brako!

HENRIETO. — Ŝi ne komprenis, ŝi kredas ke paĉjo rifuzas. Kuru, onklino mia!

ONKLINO BAŜO. — Kiel ? Ĉu, ŝi kredas ?...

SINJORO LEPIKO. — Ni ĉiam interkompreniĝas tiel !

ONKLINO BAŜO, *ekkuras*. — Mi revenigas ŝin, morta aŭ viva.

PAŬLO. — Fraŭlino, via patro kiu timigis min iomete, estis ĉarma! (*Al s-ro Lepiko.*) Ĉu ne ?

SINJORO LEPIKO. — Tio mirigas min! Sed, se vi tion diras! Je via servo.

HENRIETO. — Dankon, Dio mia!

MAGDALENO. — Dankon, Dio mia! ...Dankon, paĉjo! Iru do, kiam estas farita! Saltu al lia kolo! (*Al Paŭlo.*) Mi konas ŝin pli bone ol li; mi profunde konas ŝin! Kredu min, ŝi fariĝos bona edzineto!

HENRIETO, *post kiam ŝi kisis sian patron, kiu tamen iomete kliniĝis*. — Jes, paĉjo, mi esperas ke mi fariĝos bona edzineto!

SINJORO LEPIKO. — Tio eblas!

HENRIETO. — Ĉu vi volas ke mi diru al vi kiel mi faros ?

SINJORO LEPIKO. — Ja, diru !

HENRIETO. — Mi ĉiam faros ekzakte la malon de tio kion mi vidis fari ĉi tie.

SINJORO LEPIKO. — Bonega ideo!

MAGDALENO. — Bone respondita, Henrieto!

HENRIETO. — Oh! Se mi aŭdacus...

MADELEINE. — Ose donc ! M. Paul est là.

HENRIETTE. — Écoute, papa. Écoute-moi, veux-tu ?

MONSIEUR LEPIC, *étonné*. — Mais j'écoute.

FÉLIX. — Oh ! ma sœur qui se lance ! Elle parle à papa !

MADELEINE, *à Félix*. — Chut ! Soyons discret— *Elle entraîne Félix*.

FÉLIX. — Je voudrais bien entendre ça, moi !

MADELEINE. — Allez ! allez !

SCÈNE XI

MONSIEUR LEPIC, PAUL, HENRIETTE

HENRIETTE. — Je ne suis plus si jeune ! J'ai réfléchi depuis ma sortie de pension, depuis quatre années que je vous observe, maman et toi, j'ai de l'expérience.

MONSIEUR LEPIC. — Oh ! tu connais la vie !

HENRIETTE. — Je connais la vôtre. Je ne veux pas la revivre pour mon compte. J'en ai assez souffert !

MONSIEUR LEPIC. — À qui la faute ?

HENRIETTE. — Je ne veux pas le rechercher; mais, je jure que mon ménage ne ressemblera pas au tien.

MONSIEUR LEPIC. — Cela ne dépend pas que des efforts d'un seul.

HENRIETTE. — Cela dépend surtout de la femme. Je le sais bien. Je ferai de mon mieux et M. Paul m'aidera. (*Confiante, la main offerte.*) Oh ! Pardon !

PAUL. — Mademoiselle, votre geste était si gracieux !

HENRIETTE, *la main abandonnée*. — Je dirai toujours la vérité, quelle qu'elle soit !

MONSIEUR LEPIC. — Bon !

HENRIETTE. — S'il m'échappe un mensonge, je ne chercherai pas à me rattraper par un autre mensonge.

MONSIEUR LEPIC. — Pas mal !

HENRIETTE. — Si je commets une faute de ménagère, vous saurez le premier, et tout de suite, ma sottise. Je ne penserai jamais : ça ne regarde pas les maris !

MAGDALENO. — Ja aŭdacu! S-ro Paŭlo ĉeestas.

HENRIETO. — Aŭskultu, paĉjo. Aŭskultu min, ĉu vi volas ?

SINJORO LEPIKO, *mirigita*. — Sed mi aŭskultas.

FELIKSO. — Oh! Mia fratino kiu braviĝas! Ŝi parolas al paĉjo!

MAGDALENO, *al Felikso*. — Silentu! Ni estu diskretaj - *Ŝi foriras tirante Felikson*.

FELIKSO. — Mi ja bonvolus aŭdi tion, mi!

MAGDALENO. — Iru! Iru!

DEKUNUA SCENO

SINJORO LEPIKO, PAŬLO, HENRIETO

HENRIETO. — Mi ne plu estas tiom juna! Mi priprensis ekde mia eliro el lernejpensiono, de kvar jaroj dum kiuj mi observas vin, panjo kaj vi, mi havas sperton.

SINJORO LEPIKO. — Ho! Vi konas la vivon!

HENRIETO. — Mi konas la vian. Mi ne volas revivi ĝin por mi mem. Mi sufiĉe suferis de ĝi.

SINJORO LEPIKO. — Kiu kulpas?

HENRIETO. — Mi ne volas serĉi tion; sed mi ĵuras ke mia edziĝa paro ne similos la vian.

SINJORO LEPIKO. — Tio ne dependas de la zorgoj de nur unu!

HENRIETO. — Tio dependas precipe de la edzino. Mi tion bone scias. Mi faros kiel mi povos plej bone kaj s-o Paŭlo helpos min. (*Bonfida, la mano oferata.*) Ho! Pardonu!

PAŬLO. — Fraŭlino, via gesto estis tiel gracia!

HENRIETO, *la mano lasita*. — Mi ĉiam diros la veron, kia ajn ĝi estos!

SINJORO LEPIKO. — Bone!

HENRIETO. — Se iu mensogo elglitos el mia buŝo, mi ne provos elturniĝi per alia mensogo.

SINJORO LEPIKO. — Ne malbone!

HENRIETO. — Se mi eraras en mia mastrumado, vi la unua ekscios, kaj tuj, mian stultaĵon. Mi neniam pensos : tio ne koncernas la edzojn!

MONSIEUR LEPIC. — Bien !

HENRIETTE. — J'attendrai pour bavarder que vous ayez fini de parler. Je ne vous demanderai votre avis que pour le suivre. Je ne chercherai pas à vous être supérieure. (*Signes de tête de M. Lepic.*) Je ne dirai pas à votre enfant : ton père a tort, ou ton père n'a pas besoin de savoir ! J'aurai peut-être des amies, mais vous serez mon seul confident.

MONSIEUR LEPIC. — Avec le curé.

HENRIETTE — Papa, je ne dirai tout qu'à l'homme que j'aime.

MONSIEUR LEPIC. — C'est une déclaration !

HENRIETTE. — Oui ! chacun la nôtre. M. Paul m'avait fait, un soir, la sienne. Je viens de lui répondre, et je vous aimerai, monsieur Paul, comme vous m'avez dit que vous m'aimerez.

PAUL. — Oh ! mademoiselle !

MONSIEUR LEPIC. — Et je n'irai plus à la messe !

HENRIETTE, à Paul, hésitante. — Je n'irai plus, si vous l'exigez.

PAUL, ému — Mademoiselle, j'ai une grande liberté d'esprit !

MONSIEUR LEPIC. — C'est heureux, elle finirait par se marier civilement !

HENRIETTE, violent effort. — Si ce sacrifice était nécessaire à notre union...

PAUL. — Du tout ! mademoiselle, je ne vous demande pas ça !

MONSIEUR LEPIC. — Au contraire !

HENRIETTE. — Je l'accomplirais !...

MONSIEUR LEPIC. — Ah ! le beau mensonge !

HENRIETTE. — Papa ! j'accomplirais ce sacrifice, tant je crois au danger inévitable des idées qui ne sont pas communes.

MONSIEUR LEPIC. — Des idées religieuses !

HENRIETTE. — Surtout des idées religieuses qui ne sont pas partagées.

PAUL. — Nous partagerons tout ce que vous voudrez, mademoiselle !

MONSIEUR LEPIC. — Oh ! oh ! elle est effrayante ! Où as-tu pris cette leçon ?

HENRIETTE. — Sur ta figure des dimanches, papa !

SINJORO LEPIKO. — Bone!

HENRIETO. — Mi atendos por babili ke vi finu paroli. Mi petos vian opinion nur por sekvi ĝin. Mi ne provos superi vin. (*kapaj signoj de s-ro Lepiko.*) Mi ne diros al via infano: via patro malpravas, aŭ via patro ne bezonas scii! Mi eble havos amikinojn, sed vi estos mia nura konfidanto.

SINJORO LEPIKO. — Kun la pastro.

HENRIETO. — Paĉjo, mi ĉion diros nur al la homo kiun mi amas.

SINJORO LEPIKO. — Tio estas deklaro!

HENRIETO. — Jes! Al ĉiu la sian. S-ro Paŭlo al mi faris, iun vesperon, la sian. Mi ĵus repondis al li, kaj mi amos vin, sinjoro Paŭlo, tiel kiel vi diris al mi ke vi amos min.

PAŬLO. — Ho! Fraŭlino!

SINJORO LEPIKO. — Kaj mi ne plu iros al la meso!

HENRIETO, al Paŭlo, hezitante. — Mi ne plu iros, se vi tion postulas!

PAŬLO, emociita. — Fraŭlino, mi havas grandan mensliberon!

SINJORO LEPIKO. — Tio estas feliĉe, ŝi fine edziniĝus civilmaniere!

HENRIETO, klopodego. — Se tiu ofero estus necesa al nia edzeco...

PAŬLO. — Tute ne! Fraŭlino, mi ne tion petas de vi!

SINJORO LEPIKO. — Male!

HENRIETO. — Mi ĝin plenumus!...

SINJORO LEPIKO. — Ha! La bela mensogo!

HENRIETO. — Paĉjo! Mi plenumus tion oferon, tiom mi kredas en la neevitabla danĝero de la ideoj kiuj ne estas komunaj!

SINJORO LEPIKO. — Religiaj ideoj!

HENRIETO. — Precipe religiaj ideoj kiuj ne estas komunaj.

PAŬLO. — Ni komunigos ĉion kion vi volos, fraŭlino!

SINJORO LEPIKO. — Ho! Ho! Ŝi estas timegiga! Kie vi ricevis tiun lecionon?

HENRIETO. — Sur via dimanĉa mieno, paĉjo!

PAUL. — Elle est exquise, monsieur Lepic !

MONSIEUR LEPIC. — Aujourd'hui !

HENRIETTE. — J'aurais dû parler plus tôt !... Tu ne m'aurais pas entendue !... Et puis, il fallait l'occasion. C'est la présence d'un fiancé, d'un ami, d'un protecteur qui me donne de l'énergie. Tu ne sais pas quel homme tu es !

MONSIEUR LEPIC. — Je suis si imposant ?

HENRIETTE. — Tu ne peux pas savoir ! (*Comique.*) Tu me ferais rentrer dans un trou de souris.

MONSIEUR LEPIC. — Toi aussi ! Comme la tante Bâche ! C'est ma spécialité : ça flatte un père !

HENRIETTE. — Oh ! Papa ! Désormais, je serai brave !

MONSIEUR LEPIC. — Alors ! c'est ce que tu as dit qui te fait trembler ?

HENRIETTE. — Je me suis énervée.

MONSIEUR LEPIC. — Ah ! dame! c'était un peu fort ! Malgré le conseil de ta mère, tu n'as pas l'habitude !

HENRIETTE. — Maman ignore ce qui se passe en moi !

MONSIEUR LEPIC. — Si le curé t'avait entendue !

HENRIETTE. — Oh ! je crois qu'il m'aurait comprise, lui !

MONSIEUR LEPIC, *faux jeu.* — Justement ? Il vient.

PAUL. — Oh ! monsieur Lepic, vous êtes méchant.

MONSIEUR LEPIC. *Il rit.* — Cruel !

HENRIETTE. — Tu m'as fait peur. (*Avec reproche.*) Oh ! papa, tu me tourmentes !

PAUL. — Mademoiselle ! Mon amie !... Oui, il vous tourmente ! Tout ça n'est rien. Des mots. Des mots !

MONSIEUR LEPIC. — En effet, ce n'est qu'une crise. Ça passera !... Le temps de se marier !

HENRIETTE. — Tu ne me crois pas ?

MONSIEUR LEPIC. — Mais si, mais si ! Ta mère m'a rendu un peu défiant !

HENRIETTE. — Je suis si sincère !

PAŬLO. — Ŝi estas delikatega, sinjoro Lepiko!

SINJORO LEPIKO. — Hodiaŭ!

HENRIETO. — Mi devus paroli pli frue!... Vi tiam ne aŭdus min!... Kaj plue, necesis la okazo. Estas la ĉeesto de fianĉo, de amiko, de protektanto kiu donas al mi energion. Vi ne scias kia homo vi estas!

SINJORO LEPIKO. — Ĉu mi estas tiel impona?

HENRIETO. — Vi ne povas scii! (*Ridiga.*) Vi enirigus min en musan truon.

SINJORO LEPIKO. — Ankaŭ vi! Kiel onklino Baŝo! Tio estas mia specialaĵo: tio flatas patron!

HENRIETO. — Ho! Paĉjo! De nun, mi estos brava!

SINJORO LEPIKO. — Do! Ĉu estas tio kion vi diris kiu tremigas vin?

HENRIETO. — Mi nervoziĝis.

SINJORO LEPIKO. — Ha! Ja! Tio estis forteta! Malgraŭ la helpo de via patrino, vi ne kutimas!

HENRIETO. — Panjo ignoras tion kio okazas en mi!

SINJORO LEPIKO. — Se la pastro aŭdis vin!

HENRIETO. — Ho! Mi kredas ke li, li komprenus min!

SINJORO LEPIKO, *simule.* — Ĉu? Li venas.

PAŬLO. — Ho! Sinjoro Lepiko, vi estas malbona.

SINJORO LEPIKO, *Li ridas.* — Kruela!

HENRIETO. — Vi timigis min. (*Riproĉe.*) Ho! Paĉjo, vi turmentas min!

PAŬLO. — Fraŭlino! Mia amikino!... Jes, li turmentas vin! Ĉio ĉi estas nenio. Vortoj. Vortoj!

SINJORO LEPIKO. — Efektive, estas nur krizo. Tio forpasos!... Ĝis la tempo de edziĝo!

HENRIETO. — Ĉu vi ne kredas min?

SINJORO LEPIKO. — Jes ja, jes ja! Via patrino igis min iomete malfidema!

HENRIETO. — Mi estas tiom sincera!

MONSIEUR LEPIC — Pour le moment, c'est sûr.

HENRIETTE, — Pour le moment ?

MONSIEUR LEPIC. — Tu fais effort, comme un pauvre oiseau englué qui s'arrache d'une aile et se laissera bientôt reprendre par toutes ses plumes.

PAUL. — L'essentiel est que je vous croie, mademoiselle Henriette, et je vous crois.

MONSIEUR LEPIC. — Mais oui, va ! c'est l'essentiel. Ne te mets pas dans cet état ! Tu te fais du mal ! et tu me fais de la peine. Je n'aime pas voir pleurer la veille d'un mariage. C'est trop tôt ! (*Il l'embrasse.*) Calme-toi, ma fille, tu soupirez comme une prisonnière !

HENRIETTE. — Sans reproche, ce n'est pas gai, ici !

MONSIEUR LEPIC. — Tu vas sortir !

HENRIETTE. — Oh ! oui, et je veux être heureuse ! Ne penses-tu pas que je serai heureuse ?

MONSIEUR LEPIC. — Nous verrons ; essayez ! Mariez-vous d'abord ! (*regard à Paul.*) Il est gentil !... Quant à ton curé... je ne suis pas dupe, tu ne pourras rien. Tu ne sais pas ce que c'est qu'un curé !

SCÈNE XII

LES MÊMES, MADAME LEPIC, TANTE BÂCHE, FELIX, MADELEINE, LE CURÉ

MADAME LEPIC *annonce triomphale.* — Monsieur le curé ! Monsieur le curé !

MONSIEUR LEPIC. — Naturellement !

Il prend son chapeau pour sortir.

FÉLIX. — Ça, c'est de l'aplomb !

MONSIEUR LEPIC, *à Paul.* — Votre rival, monsieur !

PAUL. — Oh ! monsieur Lepic, restez, moi je reste !

MONSIEUR LEPIC. — Vous ne serez pas de force.

PAUL. — Avec votre appui ?

MONSIEUR LEPIC. — Je crois plutôt que je vais vous gêner.

MADAME LEPIC. — J'ai rencontré par hasard M. le curé qui a bien voulu se détourner de sa promenade. Oh ! ma fille ! Oh ! mon gendre !

PAUL. — Vous saviez donc ?

SINJORO LEPIKO. — Por la momento, tio estas certa.

HENRIETO. — Por la momento, ĉu?

SINJORO LEPIKO. — Vi klopodas, kiel kompatinda birdo enbirdogluita kiu detiras sin perflugilo kaj baldaŭ lasos sin repreni per ĉiuj siaj plumoj.

PAŬLO. — Plej grave estas ke mi kredu vin, fraŭlino Henrieto, kaj mi kredas vin.

SINJORO LEPIKO. — Sed jes, ja! Tio estas la plej grava. Ne metu vin en tiu stato! Vi faras al vi malbonon! Kaj vi afliktas min. Mi ne ŝatas vidi iun plori la tagon antaŭ edziĝo. Estas tro frue! (*Li kisas ŝin.*) Trankviliĝu, mia filino, vi suspiras kiel malliberulino!

HENRIETO. — Sen riproĉo, ne estas gaje, ĉi tie!

SINJORO LEPIKO. — Vi eliros!

HENRIETO. — Ho! Jes, kaj mi volas esti feliĉa! Ĉu vi ne pensas ke mi estos feliĉa?

SINJORO LEPIKO. — Ni vidos; vi provu! Unue geedziniĝu! (*Rigardo al Paŭlo.*) Li estas afabla!... Kaj pri via pastro... mi ne estas trompita, vi povos nenion. Vi ne scias kio pastro estas!

DEKDUA SCENO

LA SAMAJ, SINJORINO LEPIKO, ONKLINO BAŜO, FELIKSO, MAGDALENO, LA PASTRO

SINJORINO LEPIKO *triumfe anoncas.* — Sinjoro Pastro ! Sinjoro Pastro !

SINJORO LEPIKO. — Kompreneble !

Li prenas sian ĉapelon por eliri.

FELIKSO. — Tio estas aplombo!

SINJORO LEPIKO, *al Paŭlo.* — Via rivalo, sinjoro!

PAŬLO. — Ho! Sinjoro Lepiko, restu, mi, mi restas !

SINJORO LEPIKO. — Vi ne estos sufiĉe forta.

PAŬLO. — Sed kun via apogo, ĉu?

SINJORO LEPIKO. — Mi pliĝuste kredas ke mi ĝenos vin.

SINJORINO LEPIKO.— Mi hazarde renkontis s-ron pastron kiu bonvolis deturni sin de sia promonado. Ho! Mia filino! Ho! Mia bofilo.

PAŬLO. — Ĉu vi do sciis ?

MADAME LEPIC. — Dès que tante Bâche m'a détrompée, j'ai couru prévenir M. le curé !... Oh ! je vous l'ai dit, ce n'est pas un curé comme les autres ! Il est parfait ! Il ne s'occupe de rien, pas même de religion. Félix, mon grand, veux-tu le recevoir au bas de l'escalier ? Il sera si flatté !

FÉLIX, à M. Lepic. — Faut-il le remmener ?

MONSIEUR LEPIC. — Laisse ! (À Henriette.) Tu as besoin de ce monsieur ?

HENRIETTE, *craintive*. — Sa présence même te serait désagréable ?

MONSIEUR LEPIC — Oui, mais tu es libre !

MADAME LEPIC. — Qu'est-ce que ça signifie, Henriette ? Fermer la porte à M. le curé, quand je l'appelle de ta part !

MONSIEUR LEPIC. — Tu es libre ! Oh ! je ne te donnerai pas ma malédiction ; de moi, ça ne porterait pas !

HENRIETTE. — Monsieur Paul, aidez-moi !

PAUL. — Ça n'engage à rien !

HENRIETTE. — Papa, toi, un esprit supérieur ! ce ne serait qu'une simple politesse, rien de plus !

MONSIEUR LEPIC, *déjà exténué*. — Qu'il entre donc, comme chez lui !

FÉLIX. — D'ailleurs, le voilà !

SCÈNE XIII

LES MÊMES, LE CURÉ

LE CURÉ, *la main timide*. — Monsieur Lepic !... (*M. Lepic ne lui touche pas la main.*) Je ne fais qu'entrer et sortir; monsieur le maire, je viens d'apprendre, par Mme Lepic, la grande nouvelle et j'ai tenu à venir moi-même vous adresser, au père, et au premier magistrat de la commune, mes compliments respectueux.

MONSIEUR LEPIC. — Vous êtes trop aimable. Ce n'était pas la peine de vous déranger.

LE CURÉ. — Je passais ! (À Paul.) Je vous félicite, monsieur ! Vous épousez une jeune fille ornée de toutes les grâces, parée de toutes les vertus. Comme prêtre et comme ami, j'ai eu avec elle de longues causeries chrétiennes. Elle est ma fille spirituelle !

HENRIETTE, *s'inclinant, déjà reprise*. — Mon père !

SINJORINO LEPIKO. — Ekde kiam onklino Baŝo senerarigis min, mi kuris por averti s-ron pastron. Ho! Mi tion diris al vi, li ne estas pastro kiel la aliaj! Li estas perfekta. Li zorgas pri nenio, eĉ ne pri religio. Felikso kara mia, ĉu vi volas akcepti lin piede de la ŝtuparo? Li estos tiom flatita.

FELIKSO, *al s-ro Lepiko*. — Ĉu necesas forkonduki lin?

SINJORO LEPIKO. — Lasu! (*Al Henrieto*) Ĉu vi bezonas tiun sinjoron ?

HENRIETO, *timema*. — Ĉu eĉ lia ĉeesto estus al vi malagrable?

SINJORO LEPIKO. — Jes, sed vi estas libera!

SINJORINO LEPIKO. — Kio tio signifas, Henrieto ? Fermi la pordon al s-ro pastro kiam mi por vi alvokas lin!

SINJORO LEPIKO. — Vi estas libera! Ho! Mi ne donos al vi mian malbenon; de mi tio ne efikus!

HENRIETO. — S-ro Paŭlo, helpu min!

PAŬLO. — Tio neniel engaĝigas!

HENRIETO. — Paĉjo, vi, supera spirito! Tio estus nur simpla ĝentilaĵo, nenio pli!

SINJORO LEPIKO, *jam elĉerpita*. — Li eniru do, kiel en sian hejmon!

FELIKSO. — Cetere, jen li!

DEK TRIA SCENO

LA SAMAJ, LA PASTRO

LA PASTRO, *oferanta heziteman manon*. — Sinjoro Lepiko! ...(*S-ro Lepiko ne tuŝas lian manon*) Mi nur en kaj el iras; sinjoro urbestro, mi ĵus eksciis, de s-ino Lepiko, la grandan novaĵon kaj mi absolute deziris mem veni adresi al vi, al la patro, kaj al la unua juristo de la komunumo, miajn respektajn komplimentojn.

SINJORO LEPIKO. — Vi estas tro afabla. Ne necesis peni veni.

LA PASTRO — Mi pasis! (*Al Paŭlo*) Mi gratulas vin, sinjoro! Vi iĝas edzo de juna knabino ornata de ĉiuj gracioj, aŭreolita de ĉiuj virtoj. Kiel pastro kaj kiel amiko, mi havis kun ŝi longajn kristanajn babiladojn. Ŝi estas mia spirita filino!

HENRIETO, *kliniĝanta, jam rekaptita*. — Mia patr... pastro!

FÉLIX. — Moi, mon père, c'est papa. Mon pauvre vieux papa !

LE CURÉ. — Je vous la confie, monsieur Paul, vous serez, j'en suis sûr, par votre intelligence et votre libéralisme bien connus, digne de cette âme qui est d'élite, sous le rapport humain et sous le rapport divin.

PAUL, *géné par le regard de M. Lepic*. — Je tâcherai, monsieur le curé !

MONSIEUR LEPIC. — C'est déjà fait.

PAUL. — Il n'est pas mal !

MONSIEUR LEPIC. — Pas plus mal qu'un autre. Ils sont tous pareils !

MADAME LEPIC. — Tante Bâche, vous n'avez pas envie de pleurer, vous ?

TANTE BÂCHE. — Je m'épanouis ! M. le curé a une voix qui pénètre et qui remue.

PAUL. — C'est comique !

MONSIEUR LEPIC — Profitez-en !

MADELEINE. — À quand la noce ?

TANTE BÂCHE. — Le plus tôt possible. Oh ! oui ! Ne les faites pas languir !

MADAME LEPIC, *à M. Lepic*. — Mon ami ?

PAUL. — Monsieur Lepic ?

FÉLIX. — Monsieur le maire ?

MONSIEUR LEPIC. — On pourrait fixer votre mariage et celui de ce pauvre Jacquelou le même jour ! La vieille Honorine serait fière !

FÉLIX. — Oh ! c'est une chic idée !

MADELEINE. — Oh ! que ce serait amusant !

MADAME LEPIC. — Mais nous aurons, nous, un mariage de première classe ! Où mettre l'autre ?

LE CURÉ. — Mon église est bien petite !

MONSIEUR LEPIC, *détaché, absent*. — Que M. le curé fixe donc votre mariage lui-même !

MADAME LEPIC. — Oui, le mariage civil, ça ne compte pas.

FÉLIX. — Pour la femme d'un maire, maman !

FELIKSO. — Por mi, mia pastro estas paĉjo. Mia kompatinda maljuna paĉjo!

LA PASTRO — Mi ŝin konfidas al vi, sinjoro Paŭlo, vi estos, mi certas pri tio, per via inteligenteco kaj via liberalismo bone konataj, digna de tiu animo kiu estas elita, laŭ la homa vidpunkto kaj laŭ la dia vidpunkto.

PAŬLO, *ĝenata de la rigardo de s-ro Lepiko*. — Mi provos, sinjoro pastro!

SINJORO LEPIKO. — Tio estas jam farita.

PAŬLO. — Li ne estas malbona!

SINJORO LEPIKO. — Ne pli malbona ol alia. Ili estas ĉiuj samaj!

SINJORINO LEPIKO. — Onklino Baŝo, ĉu vi ne emas plori, vi ?

ONKLINO BAŜO. — Mi gajmieniĝas! S-ro Pastro havas voĉon kiu penetras kaj kiu emociigas.

PAŬLO. — Estas komike!

SINJORO LEPIKO. — De tio profitu!

MAGDALENO. — Kiam la edziĝofesto?

ONKLINO BAŜO. — Kiel eble plej frue. Ho! Jes! Ne sopirigu ilin!

SINJORO LEPIKO, *al s-ro Lepiko*. — Mia amiko, ĉu ?

PAŬLO. — Sinjoro Lepiko, ĉu ?

FELIKSO. — Sinjoro urbestro, ĉu ?

SINJORO LEPIKO. — Oni povus fiksi vian edziĝofeston kaj tiun de tiu kompatinda Jakĉjo por la sama tago! La maljuna Honorino estus fiera!

FELIKSO. — Ho! Tio estas simpatia ideo!

MAGDALENO. — Ho! Kiel amuza estus tio!

SINJORINO LEPIKO. — Sed ni havos, ni, unuaklasan edziĝofeston! Kie meti la alian?

LA PASTRO — Mia preĝejo estas ja malgranda!

SINJORO LEPIKO, *indiferenta, malestanta*. — S-ro pastro do mem fiksi vian edziĝofeston!

SINJORINO LEPIKO. — Jes, civila edziĝofesto, ja ne gravas.

FELIKSO. — De urbestra edzino, panjo!

MADAME LEPIC. — Je veux dire que ce n'est qu'une formalité, des paperasses, enfin, je veux dire...

LE CURÉ. — Respect à la loi de votre pays, madame Lepic ! Pour ma part, je propose le délai minimum, et, malgré la dureté des temps, je vous ferai cadeau d'un ban.

FÉLIX, *bas, à Madeleine.* — Ça coûte trois francs !

MADAME LEPIC. — Il va de soi que la place de M. le curé est à la table d'honneur des invités.

FÉLIX. — Il y sera !

LE CURÉ. — Mme Lepic me gêne toujours ! J'ai dû, ce matin, interrompre mon jeûne pour ne pas laisser perdre ce merveilleux civet qu'elle a daigné me faire parvenir.

FÉLIX. — Ah ! Oui ! Le lièvre de papa qui avait tant réduit en cuisant !

MADAME LEPIC. — M. le curé exagère et Félix manque de tact ! Comme cadeau de retour, M. le maire ferait bien de rétablir la subvention de la commune à M. le curé... C'est accordé ?

M. Lepic la regarde fixement.

LE CURÉ. — Oh ! madame Lepic, je vous en supplie, pas de politique ! Je sais que, par M. Lepic, l'argent qui se détourne de moi va aux pauvres.

FÉLIX. — Pas trop longue, hein ! la messe, monsieur le curé ?

LE CURÉ, *agacé.* — Monsieur ! s'il vous plaît ?

PAUL. — À cause de M. Lepic.

MONSIEUR LEPIC. — Parlez pour vous ! Ça ne me gêne pas ! Je n'irai pas !

MADAME LEPIC. — Ce jour-là, un franc-maçon saurait se tenir ! M. le curé fera décevantement les choses. Il sait son monde, comme M. Lepic, il n'a que des délicatesses et il vient de me promettre une surprise. Après la messe, mon cher Paul, dans la sacristie, il vous récitera une allocution en vers de sa composition.

TANTE BÂCHE. — Oh ! des vers ! On va se délecter. Un mariage d'artistes !

PAUL. — Ah ! monsieur le curé taquine la muse ?

MONSIEUR LEPIC. — Parbleu !

LE CURÉ. — Oh ! à ses heures !

SINJORINO LEPIKO. — Mi volas diri ke tio estas nur formalajo, paperaĵaĉoj, fine, mi volas diri...

LA PASTRO — Respekton al la leĝo de via lando, sinjorino Lepiko! Miaflanke, mi proponas la minimuman templimon, kaj, malgraŭ la nuntempa malfacileco, mi donace afiŝos la proklamon de via edziĝofesto.

FELIKSO, *mallaŭte, al Magdaleno.* — Tio kostas tri frankojn!

SINJORINO LEPIKO. — Evidente estas ke la sidloko de s-ro pastro estos ĉe la honora tablo de la gastoj.

FELIKSO. — Tie li ĉeestos!

LA PASTRO — S-ino Lepiko ĉiam dorlotas min! Mi devis, hodiaŭ matene, interrompi mian faston por ne lasi fuŝiĝi tiun mirindan raguon kiun ŝi degnis alvenigi al mi.

FELIKSO. — Ha! Jes! La leporo de paĉjo kiu tiom malgrandiĝis kuirante!

SINJORINO LEPIKO. — S-ro pastro troigas kaj mankas al Felikso takto! Kiel redona donaco, s-ro urbestro devus restarigi la komunuman subvencion al s-ro pastro... Ĉu estas akceptite?

S-ro Lepiko fikse rigardas ŝin.

LA PASTRO — Ho! S-ino Lepiko, mi petegas vin, neniun politikumado! Mi scias, de s-ro Lepiko, ke la mono, kiu ne iras al mi, iras al la malriĉuloj.

FELIKSO. — Ne tro longa, ĉu ne, la meso, sinjoro pastro?

LA PASTRO, *incitata* — Sinjoro! Mi petas vin, ĉu?

PAŬLO. — Pro s-ro Lepiko.

SINJORO LEPIKO. — Parolu por vi! Tio ne ĝenas min! Mi ne iros!

SINJORINO LEPIKO. — Tiun ĉi tagon, framasono sciis sinteni! S-ro pastro dece faros. Li konas sian mondon, kiel s-ro Lepiko. Li havas nur delikatajn intencojn kaj li ĵus promesis al mi surprizon. Post la meso, mia kara Paŭlo, en la sacristio, li recitos al vi memverkitan versan festparoladon.

ONKLINO BAŜO. — Ho! Versoj! Ni gustos! Edziĝofesto de artistoj!

PAŬLO. — Ha! Ĉu sinjoro pastro tiklas la muzon?

SINJORO LEPIKO. — Kompreneble!

LA PASTRO — Ho! De tempo al tempo!

FÉLIX. — Et il a le temps !

LE CURÉ. — Humble curé de campagne !...

MONSIEUR LEPIC. — Ne faites pas le modeste ! Il y a en vous l'étoffe d'un évêque !

LE CURÉ. — Trop flatteur ! (*Toutes ces dames s'inclinent déjà.*) Mais vous, monsieur le maire, je vous apprécie comme il convient ! Par votre sagesse civique, la hauteur de vos idées et la rigidité de votre caractère, vous étiez digne de faire un excellent prêtre.

MADAME LEPIC. — Il a raté sa vocation !

MADELEINE. — Il sait pourtant bien son catéchisme !

MONSIEUR LEPIC. — Un prêtre, peut-être, monsieur, mais pas un curé !

TANTE BÂCHE. — Quelle belle journée ! Comme elle finit bien !

PAUL. — Tu n'as plus la frousse, ma tante ? Ça finit par un mariage, comme dans les comédies de théâtre, mon cher beau-père !

MONSIEUR LEPIC. — Oui, monsieur, ça finit... comme dans la vie... ça recommence. (*Au curé.*) Une fois de plus, monsieur, vous n'aviez qu'à paraître.

M. Lepic se couvre et s'éloigne suivi de Félix.

FÉLIX. — Toujours comme papa !

Moment pénible, mais Mme Lepic sauve la situation.

SCÈNE XIV

MADAME LEPIC

MADAME LEPIC. — M. Lepic va faire son petit tour de jardin. C'est son heure. Il ne se permettrait pas de fumer sa cigarette devant ces dames. Il reviendra. Il revient toujours. (*Elle pousse le fauteuil à M. le curé.*) Monsieur le curé ! le fauteuil de M. Lepic ! (*le curé s'installe; elle offre une chaise à tante Bâche.*) Vous devez être fatiguée ?... Assieds-toi donc, Madeleine !... Annette, servez le goûter !... Mes enfants ! votre mère est heureuse ! Cher Paul, embrassez notre Henriette, M. le curé vous bénira. Embrassez-la, allez ! Vous ne l'embrasserez jamais autant que M. Lepic m'a embrassée.

FELIKSO. — Kaj li havas tempon!

LA PASTRO. — Humila kamparana pastro!...

SINJORO LEPIKO. — Ne faru la modestulon! Estas en vi episkopa kapableco.

LA PASTRO. — Tro flate! (*Ĉiuj sinjorinoj jam kliniĝas.*) Sed vi, sinjoro urbestro, mi estimas vin kiel konvenas! Per via civita saĝeco, la alteco de viaj ideoj kaj la rigideco de via karaktero, vi estus inda iĝi bonega pastro.

SINJORINO LEPIKO. — Li mankis sian alvokiĝon!

MAGDALENO. — Li tamen bone scias sian kateĥismon.

SINJORINO LEPIKO. — Eble pastro, sinjoro, sed ne paroĥestro!

ONKLINO BAŜO. — Kia bela tago! Kiel ĝi bone finiĝas!

PAŬLO. — Ĉu vi ne plu timegas, mia onklino ? Tio finiĝas per edziĝo, kiel en teatraj komedioj, mia kara bopatro!

SINJORINO LEPIKO. — Jes, sinjoro, tio finiĝas... kiel en la vivo... tio rekomenciĝas. (*Al la pastro.*) Unufoje pli, sinjoro, vi bezonis nur aperi.

Sinjoro Lepiko surmetas sian ĉapelon kaj foriras sekvata de Felikso.

FELIKSO. — Ĉiam kiel paĉjo!

Peniga momento, sed s-ino Lepiko savas la situacion.

DEK KVARA SCENO

SINJORINO LEPIKO

SINJORINO LEPIKO. — S-ro Lepiko promenetos en la ĝardeno. Estas lia horo. Li ne permesus al si fumi sian cigaredon antaŭ tiuj sinjorinoj. Li revenos. Li ĉiam revenas. (*Ŝi puŝas la brakseĝon al s-ro pastro*) Sinjoro pastro! La brakseĝo de s-ro Lepiko! (*La pastro instaliĝas; ŝi proponas seĝon al onklino Baŝo.*) Vi estas verŝajne laca, ĉu ne? Sidiĝu do, Magdaleno! ... Aneto, servu la manĝeton!... Infanoj miaj! Via patrino estas feliĉa! Kara Paŭlo, kisu vian Henrieton, s-ro pastro benos vin. Kisu ŝin, bonvolu! Vi neniam kisos ŝin tiom kiom s-ro Lepiko kisis min.